


esperanto gazeto

DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO



48-49

**MARTO-APRILIO
1971**



EL LETEROJ AL LA REDAKCIO

JES, NI KOMPRENAS

Post SAT-Kongreso en Novi Sad mi vojaĝis en 15 landoj dum dek monatoj, por prezenti kalkulaparaton SOROBAN por lernantoj en diversaj landoj kaj mi estis tre ĝoja, kiam mi konstatis, ke tio estis bona propagando de nia lingvo. Vere nia lingvo devas esti uzata en la praktiko, ne nur inter esperantistoj, sed kiel komunikilo inter ne-esperantistoj por servi al ili. Se vi permesas al mi diri tion, ke estas multaj esperantistoj kiuj klopodas multnombri miajn samideanojn. Bone, sed se ni uzas tiun energion por servi en praktika uzado, ĉu ni ne ricevas pli da efiko por akiri samideanojn. Mi ne povas bone esprimi — sed mi kredas ke vi komprenas, kion mi volas diri.

Estimata samideano, tiurilate mi multe gratulas vin pro via iniciatemo de IOE, kaj deziras grandan sukceson. Samideane via

Kimie Markarian
Britujo

NIA KOVRILPAGO

La plej mallarĝa parto de Danubo havas plurajn nomojn: Gerdap, Kazan, Fera Pordego, k. a. En ĝi Jugoslavio kaj Rumanujo kune konstruas gigantan hidroelektran centralon. La plurjara laboro baldaŭ finiĝos, multaj centoj da laboristoj laboris kaj laboras ambaŭflanke — ne konante reciproke la lingvon de siaj najbaroj. Ili tamen interkompreniĝas kaj amikiĝas, ĉar iom post iom ili lernis la alian lingvon. Ĉu ne estus multe pli facile interkompreniĝi per Esperanto? Mankis iniciato kaj iniciatanto.

DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ

Sajnas al mi, ke vi konas nur praktikon materialan — por E nun malmulte esperan — kvankam laŭ miaj spertoj estus EG por orientanoj centoble pli alloga, se en ĝi ekzemple estus kompleta »Deklaracio de Homaj rajtoj«, kiu estas nacilingve en multaj landoj nerenkonebla kaj tamen serĉata. En nepagipovaj landoj ne gravas eldono de ĝi de UEA.

Bohuslav Grim
Ĉeĥoslovakio

Resp. de la Red.: Kara amiko! Se ni volus aperigi ĉion kion oni postulas de ni, la amplekso de EG devus esti duobla eĉ se ni nenion publikigus el la materialo kiun ni deziras publikigi kaj por kio ni ekzistas. Ĉiu leganto havas alian guston kaj aliajn proponojn kaj postulojn. Tamen, Esperanto-Gazeto estas organo de IOE kaj devas okupiĝi ĉefe pri la temoj kiuj apartenas al ĝia programo. Kelkajn aliajn artikolojn mi enŝovas por ke la gazeto ne estu seka kaj estu legebla al pli vasta publiko. Ni speciale klopodas ne duobligi aferojn kaj ne enmiksiĝi en kompetentecon de aliaj esperantistaj institucioj kaj organizaĵoj. Pro tio mi tre bedaŭras, sed ne povas plenumi vian deziron.

MALFRUA VOĈDONO

Mi respondas je via letero kiun mi ricevis komence de decembro. Bedaŭrinde antaŭ via letero mi ne ricevis cirkuleron kun la voĉdonilo.

Mi petas vin ke vi sendu tuj al mi tiun cirkuleron kun voĉdonilo. Mia granda deziro estas ke vi envicigu min en la liston de viaj kunlaborantoj.

Luka Tibol
Jugoslavio

Resp. de la Red.: La voĉdonilo, kiun vi ne ricevis, koncernis la kandidatojn por la nova Direkcio de IOE. Tiu direkcia jam estas elektita per granda plimulto de la kunlaborantoj, do ĝi ne plu estas aktuala. Samtempe ni starigis demandon al miaj kunlaborantoj, ĉu ili deziras resti plu kunlaborantoj kaj ion seriozan fari por kontribui al la efektiva de nia programo, kaj en kiu sekcio. Ĉar vi ne esprimis



En renovigita sidejo de esperantistoj en Jelenia Góra (Pollando) la »Mondmapo« estas ne nur unu el la ĉefaj ornamaĵoj, sed ankaŭ la sola tuj rimarkebla orientigilo pri tutmondaj kontaktoj de la Filia membraro, kiu... diskutas kaj legas dum ĉiusemajnaj kunvenoj.



specialan intereson pri iu sekcio, ni notis vin por ĝenerala laboro. Se vi povas helpi en iu sekcio, bonvolu informi nin. Jen la sekcioj: Sociaj organizaĵoj; Diplomatio kaj interŝtataj rilatoj; Internaciaj kongresoj kaj konferencoj; Scienco kaj tekniko; Kulturaj aktivadoj; Turismo; Sporto; Informado (ne informado pri Esperanto, sed enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn de informservoj).

ĈU IOE SANGIS SIAN NOMOS?

Kun plezuro mi legis en la decembra numero (1970) de ESPERANTO, revuo internacia, sur du paĝoj tre laŭdan artikolon pri la Internacia Pupteatra Festivalo de Zagreb, kiun laŭ mia scio iniciatis kaj ankoraŭ patronas IOE.

Tiu ĉi rekono flanke de UEA devis kortuŝi ĉiun sinceran amikon de la Internacia Lingvo, des pli, ĉar ĝis nun ni vidis nur ignoradon de via valora kaj praktika laboro de tiu flanko.

Tamen, surprizis min, ke inter la patronoj de PIF ĉiuj estis menciitaj, escepte IOE. Mi povis legi nur la literojn i. a. Kaj nun mi ne scias ĉu tio signifas »inter aliaj«, kio tre mirigis min, aŭ eble via Instituto ŝanĝis sian nomon de IOE al i. a., kio kompreneble ĉagrenus min.

Sincere via John Matasin
Aŭstralio

Resp. de la Red.: Ni povas informi vin, ke vi ne devas ĉagreni: IOE restis IOE. La publikigo koncernas la grandan sukceson de PIF. Kaj IOE ekde la komenco de sia laboro ĉiam klopodis ke la aferoj okazu, eĉ se oni tuj forĝas kiu faris ilin. Do, kara amiko, nek miru, nek ĉagrenu, sed daŭre kunlaboru, kaj ni promesas ke ankaŭ ni plue klopodos plenumadi niajn programojn laŭ la eblecoj.

MALBONA PRAKTIKO

Estimataj amikoj!

En Hungara Vivo n-ro 2/1970 aperis artikolo tre interesa por inĝenieroj nome »Realigintaj revoj sur la tornilo«. Mi interesigis miajn kompetentajn kolegojn, kaj estis feliĉa, unuafoje pruvi Esperanton en la praktiko. Mi tradukis la artikolon kaj skribis leteron (ambaŭ estis pagataj kiel ekster-profesia laboro laŭ validaj prezoj) al la Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto, petante pli detalajn informojn resp. necesan adreson, prospektajn. Sendinto estis la enterpreno, en kiu mi laboras. Tio okazis en septembro 1970 — sed ĝis nun alvenis nenia respondo. Kiel Esperantistino mi hontas pro tia maniero. Tio estas malbona rimedo, kontaktigi kun ne-esperantistoj kaj favorigi ilin por Esperanto. — Similan mi jam spertis kiam mi skribis al la Hungara Esperanto-Asocio pro aliaj aferoj.

Kiel jam supre dirite, tio nur estu informo pri tio, kiamaniere respondeciga organizo ĉagrenigas esperantiston kaj ne-esperantistojn.

Kun koraj salutoj
Hildegard Leubner
Germana Dem. Resp.

Resp. de la red.: Eble vi ne sekvis la plej gustan vojon. Estus multe pli efike peti de HEA nur adreson de la koncerna entrepreno kaj de ĝi rekte peti pli detalajn informojn. La redakcioj ne povas korespondi pri aferoj ekster ilia kompetenteco. Ili, transpenis la informon de iu kaj skribis ĉiom kion ili eksciis pri la afero. Aliflanke la redakta komitato devus sendi la adreson aŭ respondi ke ĝi ne scias ĝin. HV ne estas la sola kiu ne respondadas.

ANONCETOJ

Mi tre ŝatas vian gazeton. En ĝi troviĝas interesaj artikoloj kaj indikoj utilaj por esperantistoj. Dum la lasta jaro aperis en via gazeto alvokoj por utiligi Esperanton. Unu alvoko okupiĝis pri sendado de tradukitaj artikoloj el la nacilingva gazetaro por la E-klubo en Taŝkent (Sovetio). Mi faris tion, klopodante plenumi la peton, sed vane mi atendis respondon. Ankaŭ de la Esperanto-klubo UFA okaze de Leninmemoro mi neniam ricevis eĉion. Mongola s-ano petis pri gratuladreso okaze de festotago de la respubliko. Nenia respondo! Mi tre bedaŭras ke oni ne povas rilati kun sovetiaj amikoj. Estus pli bone por la estonto ne plu aperigi tiajn senutilajn proponojn ŝparante samtempe tempon kaj monon. La kaŭzojn mi ne konas, sed verŝajne politikaj.

Franz Schick
Aŭstrujo

Resp. de la Red.: Ni longe hezitis enkonduki anoncetojn en Esperanto-Gazeton, sed ni devis cedi ĝuste sub la konstanta premo el Sovetio kaj iom malpli el Bulgarujo. La redakcio ne povas garantii respondojn, ĉar ĝi eĉ ne konas la sendintojn de la anoncetoj. Nia celo ne estas interrilatigi esperantistojn, ni tion faras nur por ne perdi la legantojn kiuj insistas pri aperigo de korespondanconoj, sed se tiaj aferoj ripetigos, ni certe ĉesos aperigi ilin, por ne perdi la aliajn abonantojn kiuj sentas sin trompitaj.

PRISEKSA RUBRIKO

Rimarko de leganto rilate al ESPERANTO-GAZETO nr. 47, p. 9, la spritaĵo pri adulti/kokri:

Trudas sin la konstato, ke IOE post la siatempa provo enkonduki en la revuon priseksan rubrikon (nr. 30), nun ree cedis al tento kontrabandi »nesanan varon«. Jes, tio estas nur didaktika spritaĵo, sed

tamen... Oni ne donu civitanajn rajtojn al fiaj, hontindaj faroj!

Tadeusz Nowakowski
Pollando

Resp. de la Red.: En PV adulto = peko kontraŭ la geedzeca fideleco; kokri = trompi sian edz(in)on. Se vi ne kondamnas por tiuj vortoj la Plenan vortaron, kiu ankaŭ okupiĝas pri tiuj seksaj »necesaj varoj«, kial vi nin kondamnas? Aŭ eble la desegnaĵo estas malpli deca ol ekz. la fama pentraĵo »Leda kun la cigno« de Leonardo da Vinĉi, aŭ aliaj pli malpli famaj majstroverkoj? Aŭ la temo ne plaĉas al vi? Eble en via urbo ne okazas adulto kaj kokroj, sed en la tuta cetera mondo okazas. Kaj pri ĉio kio okazadas kaj ne estas deca, oni faras karikaturojn kaj ŝerojn por primoki ilin. Eble vi tion ne ŝatas, sed aliaj ĝuas en ĝi, multaj ricevas vomemon pro la senĉese ripetata vorto »paco«, kiam ĝi nenian ligon havas kun la temo, tamen ili silentas, ĉar ekzistas eble homoj al kiuj tio plaĉas. Gustoj estas tre diversaj. Tamen mi ne kredas ke iu pro nia karikaturo trompos sian edz(in)on, do mi neniam endanĝerigis.



Denove pri sekso! Ĉu ili ne havas iun pli seriozan temon?

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO.

La redakcio dankas pro la multaj bondeziroj alvenintaj okaze de la semajno de internacia amikeco, kaj al ĉiuj reciprokas la bondezirojn. Estu amikeco inter ni ĉiam, ne nur dum unu semajno!

GASTIGADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Mi ne povas kunlabori, ĉar mi (76 jara) jam malbone vidas, sed esperantistoj kiuj vizitas mian landon, povas viziti min, ĉe mi dormi kaj manĝi senpage. Tiun-ĉi lastan frazon vi povas publikigi en via klubo kaj en la revuo. František Svačina, instruisto de Esperanto, LANZHOT, okr. Břeclav, Ĉeĥoslovakio.

Resp. de la Red.: Tre volonte kun danko je la nomo de ĉiuj legantoj.

ESPERANTO-GAZETO

ORGANO DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO

MARTO-APRILO ★ N-ro 48—49 (Jaro VI 3—4)

Ĉefredaktoro: T. Sekelj, 11.000 Beograd, Pop Lukina 1.

Aperas 10 foje jare.

Bankkonto: Beogradska udružena banka, 608-620-1-1-32000-10-458 I.O.E. Beograd, Jugoslavio Por Jugoslavio: 608-8-1353-10

ESPERANTO-GAZETO. Izdaje: Meĉunarodni institut za ozvaniĉenje esperanta, Lole Ribara 14, 11000 Beograd.

Odgovorni urednik: Antonije Sekelj, 11.000 Beograd, Kondina 24.

Stampa: Stamparija „Sava Mihić“ Zemun, Maršala Tita 46-48.

DANUBA KAMPANJO

Internacia gvidanto de la Kampanjo
Nik. Nikolov
P. K. 45, Sofia, Bulgarujo

La Danuba Kampanjo estas lanĉita (v. IOE-Gazeto, oktobro 1967). Per ĝi ni klopodas enkonduki esperanton en la danuban trafikon: ŝipanoj, havenoficistoj kaj laboristoj, deĵorantoj en poŝtejoj, bankoj, magazenoj, hoteloj, restoracioj k. s., situantaj sur la bordoj, estos objektoj de nia kampanjo.

La ĝisnuna sperto montris, ke ni ne sukcesos atingi konsiderindajn rezultojn, se niaj klopodoj ne direktigas samtempe supren kaj malsupren, t. e. esperantigi la gvidantojn, oficistojn kaj la laboristojn.

Kion ni devas fari?

1. Ĉiu apuddanuba landa esperanto-asocio principe konsentu pri la graveco de la Danuba Kampanjo kaj pri aktiva partopreno por sukcesigi ĝin.

2. En ĉiu lando estu 3—5 membra komisiono, kiu respondecu kaj zorgu pri la evoluo de la kampanjo en la lando. En ĉiu danuba havenurbo kie ekzistas esperanto-societo, ĝi havu 1—2 personojn, kiuj surloke respondecu kaj laboru por la kampanjo. Plej bone estus se tiuj societoj transprenus kolektive la tutan kampanjon kiel sia ĉefa tasko. Tio donus al ĝi novan, konkretan, esperigan laborenthavon kun atingebla celo.

3. En ĉiu lando la landaj danubaj komisionoj faru liston de la societoj kaj personoj laborantaj en la kampanjo kaj apartan liston de personoj, objektoj de la kampanjo, kiuj jam lernas aŭ parolas la internacian lingvon. Tiuj listoj periode devas esti aktualigitaj. La diverslandaj komisionoj interŝanĝu la liston de siaj kunlaborantoj por ke ili inter si povu kontakti kaj interŝanĝi spertojn, eĉ eble vizitojn.

4. La apuddanubaj societoj devas ricevi de la landaj asocioj konstantan konkretan helpon por vigligo de la ĝenerala esperanto-agado kaj konkrete por la Danuba Kampanjo. Disponigi al ili abundan propagandan materialon: flugfoliojn, afiŝojn, informajn bultenojn, ekspozician materialon ktp.

5. Al la gvidantoj de la danuba trafiko ni regule sendadu informan materialon pri esperanto. Plej konvena materialo estas periodaj nacilingvaj bultenoj.

6. Ĉe konvenaj lokoj sur la bordoj oni lokigu grandajn sloganojn favore al esperanto.

7. En atendejoj de stacidomoj, havenoj, poŝtejoj, hospitaloj, hoteloj k. a. ni pendigu, aŭ lasu sur tabloj por legado, informan materialon pri la lingvo.

8. En urbaj kaj fakaj gazetoj ni periode aperigadu konvenajn materialojn pri esperanto kaj ties avantaĝoj ĉe internaciaj kontaktoj.

9. La societoj kaj unuopuloj organizu specialajn esperanto-kursojn ligitajn al la Danuba Kampanjo. Se tio momente ne estas ebla, oni invitu la interesintojn al ĝenerala kurso.

10. Ĉar multaj el la personoj — objektoj de nia kampanjo — konstante veturas aŭ deĵoras, ni rekomendu al ili korespondan kurson aŭ

ESPERANTO KAJ LA INTERNACIA DANUBA NAVIGADO (T.I.D.)

De la 2-a de julio ĝis la 6-a de septembro ĉi-jare la 16-an fojon okazos Internacia Danuba Navigado (TID). Ĝi komenciĝas de Ingolŝtato, GFR kaj finiĝas en la bulgara urbo Silistra. Tiu ĉi grandioza amatora navigado estas farata per boatoj kun remiloj. En ĝi partoprenas multe da personoj ne nur el la danubaj landoj, sed eĉ el aliaj kontinentoj. Oni povas aliĝi al la naviganta grupo en kiu ajn punkto kaj same forlasi ĝin kie ajn.

TID estas organizata kaj efektivigata de turismaj aŭ sportaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas per akvosporto en la landoj tra kiuj pasas la navigado: GFR, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Jugoslavio kaj Bulgarujo. Ĉiujare estas nomata internacia prizorganto de la navigado. Ĉi-jare organizanto kaj efektiviganto de TID estas: **MAGYAR TERMÉSZETBARÁT SZÖVETSÉG**. Rosenbergházaspár utca 1, BUDAPESTO V. HUNGARUJO. Ĝi ellaboras la programon kaj la planon de navigado de la 16-a TID.

Celo de TID estas interamikigo de la partoprenantoj, ekkono de la kulturaj vidindaĵoj, de naturaj belaĵoj, de la ekonomiaj sukcesoj en la danubaj landoj, pligrandigo de la amikeco inter la popoloj kaj plifirmigo de la monda paco.

En TID estas parolataj kelkaj lingvoj. La originala nomo kaj statuto de TID estas skribitaj en franca lingvo. Plej multe estas uzata tamen la germana. Pri esperanto iuj el la gvidantoj aŭdis pli konkretajn informojn kiam mi kontaktis ilin rilate nian Danuban Kampanjon.

Nia penetro en TID estas tre grava kaj signifoplena por la sukcesa disvolvigo de la kampanjo por esperantigo de Danubo. La partoprenantoj en TID ne nur remas, sed ripozas, promenas kaj dormas ĉiuvespere en alia danuba urbo. Se inter la remantoj estus grupo de esperantistoj el malsamaj landoj, kiuj bone interkomprenigas per la internacia lingvo, se la neesperantistoj navigantoj en ĉiu urbo estus demandataj ĉu ili parolas esperanton kaj en okazo de

konvenan lernolibron por memstara lernado de la lingvo.

11. Organizado de diversaj internaciaj kaj landaj esperanto-eventoj en ĉedanubaj lokoj, estas rekomendinda. Ankaŭ internaciaj ekskursoj per danubaj ŝipoj estas tre utilaj por vekti la intereson al esperanto kaj samtempe por praktiki ĝin.

12. Profiti la sportajn eventojn, speciale la ĉiujare ripetigatajn, por instigi la partoprenantojn kaj organizantojn uzi esperanton.

Se ni laboros entuziasme, insiste, metodike, ni povos atingi konsiderindajn rezultojn. La laboro estas granda kaj devas daŭri multajn jarojn kun granda persisto. Ni mobilizu niajn fortojn kaj rimedojn por tio.

kapneado ili ricevus esperanto-propagandilojn tio certe forte impresus la partoprenantojn de la navigado kaj la organizantojn de TID.

Kion konkrete ni devas fari?

1. En la landaj komisionoj pri la Danuba Kampanjo unu persono devas respondeci pri penetro de esperanto en TID. Li devas havi kontakton kun la landa organizaĵo kiu zorgas pri TID, faciligi la partoprenon de esperantistoj en TID, organizi la propagandon de esperanto en la danubaj urboj de sia lando ĉe la alveno de la TID-partoprenantoj. Tion oni efektivigos kun la aktiva helpo de la danubaj esperanto-societoj kaj unuopuloj.

2. Per cirkularaj leteroj kaj per artikoloj en la esperanto-gazetaro ni altiru la intereson de la esperantista junularo al TID por ke ĝi partoprenu la navigadon. Tiurilate multon povas fari la landaj junularaj sekcioj.

3. Al la partoprenantoj en TID oni donadu multe da informoj pri esperanto. Por tiu celo la landaj esperanto-organizaĵoj devas disponigi sufiĉe variajn, trafajn kaj aktualajn propagandilojn.

4. Oni eldonu la kanton de TID en esperanto sur disko. Se estas ebleco oni eldonu la statuton kaj aliajn dokumentojn de TID en esperanto.

5. En kelkaj danubaj ubroj de ĉiu lando tra kiu pasas la navigado estu aranĝataj esperanto-eventoj en la tago de la alveno de la TID-anoj. Por tiu celo estu altirataj esperantistoj de aliaj lokoj por helpi.

6. La esperantistoj serĉu kontakton kun oftaj partoprenantoj en la navigado. Post la navigado la kontakto daŭru per leteroj. Tio pligrandigas la eblecojn ke pli multe da navigantoj ellemu kaj apliku esperanton.

7. Al la landaj prizorgantoj de TID oni sendu leterojn petante informojn pri TID, horaron, eblecojn por partopreno k. a. Kompreneble se vi skribas leteron al vialanda prizorganto de TID ĝi devas esti skribita en nacia lingvo.

8. La Kampanjo TID same kiel la Danuba Kampanjo bezonas multe da fortostreĉo kaj elspezo de mono. Estas esperantisto, kiuj ne povas partopreni la kampanjojn aktive, sed volonte helpos ilin per mono. Oni devas agi konforme al la lokaj kondiĉoj.

9. La farena laboro pri la Danuba Kampanjo validas ankaŭ por la Kampanjo TID.

Jen adeso de TID-prizorgantoj:

Deutscher Kanuverband, Herrn Leo Rohlen, Schwarzestr. 58, 43 Essen-Altenessen, F. R. Germanujo.

Österreichischer Padelssportverband, Berggasse 15, 1090 WIEN, Aŭstrujo. CSTV-Slovensky výbor, Volgogradská 1, Bratislava, CSSR. Magyar Természetbarát Szövetség, Rosenbergházaspár utca 1, Budapest V, Hungarujo.

Turisticki Savez Beograda, ul Moše Pijade 1, 11000 Beograd.

Bulgara Turista Asocio, bul. Tolbuhin 18. Sofia, Bulgarujo.

En la kampanjo laŭ siaj fortoj kaj eblecoj povas partopreni ĉiu esperantisto. La rezultoj kaj la sukceso dependas de ni ĉiuj. Senprokraste aliĝu al la kampanjo kaj ekagu

INTERESAJ NOVAĴOJ

FILMO EN ESPERANTO PRI LA NORVEGAJ FERVOJOJ

Spertinte la grandan intereson, kiun vekis ĝiaj turistbroŝuroj en Esperanto, la Norvega Ŝtata Fervojo nun pretigis ankaŭ Esperanto-version de sia turistfilmo pri vojaĝo en suda Norvegujo, sub la titolo «Mi estis tie». Temas pri 16-mm kolorfilmo kun parolo en Esperanto, kies prezento daŭras 20 minutojn. Esperantistaj organizaĵoj dezirantaj partopreni ĝin, povas turni sin al Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo 1, sendante, se eble, du internaciajn respondkuponojn. Ĉar ekzistas nur kelkaj kopioj de la filmo, oni devas efektiviĝi la petojn laŭvice.

ESPERANTO EN AFRIKO

La Afrika Komisiono de TEJO, kies membroj troviĝas en 12 afrikaj landoj, nun eldonas monatan bultenon sub la titolo «Esperanto en Afriko». La bulteno estas redaktata en Madagaskaro kaj multobligata en Senegalo.

Ek de januaro Esperanto-kurso okazas en la Afrika Kultura Centro de Dakar (Senegalo), ĝin vizitas dudeko da lernantoj.

Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro starigis tri novajn kursojn en la lernejoj de Tananarive.

KUBO. La Ministerio pri Edukado entreprenas paŝojn por enkonduki la instruadon de Esperanto kaj organizi en la lando la Esperanto-movadon. — Ampleksa artikolo pri E-o kaj la lingva problemoj aperis la 17.

STARTO DE DANUBA KAMPANJO

La Beograda danubrafika entrepreno **JUGOSLOVENSKO REĈNO BROADARSTVO** organizis Esperanto-kursojn por 30 personoj el diversaj sekcioj de la Direkcio, kiel komenco de enkonduko de Esperanto en la praktikan uzon laŭlonge de Danubo. La kurson gvidas la ĝen. sekretario de IOE, A. Sekelj, laŭ aŭdvida struktura metodo. Inter la

tistaj organizaĵoj en la danublandoj kaj havenurboj estas petataj kunhelpi sukcesigi tiun programon, sed interkonsente kun la gvidanto de kampanjo, N. Nikolov, ĉar sen tio oni povas eĉ malutilon krei pro ne kono de la jam entreprenitaj paŝoj, sukcesoj, malsukcesoj kaj stato de la afero. Informojn kaj proponojn oni bonvolu ankaŭ sendi al la gvi-



Parto de la kursanoj (Foto: M. Kijdobranski)

kursanoj estas ankaŭ kelkaj gravaj funkciuloj. El ili certe fariĝos ankaŭ estontaj kursgvidantoj, tiel ke la entrepreno memstare, sen helpo de esperantistoj el ekstere, povos instrui la ŝipanojn, havenpersonaron kaj la aliajn direkciajn. Jen konkreta komenco, imitinda en ĉiuj ĉedanubaj landoj. Esperanto

danto, ke li estu ĉiam komplete informita.

Vanaj estas ĉiuj klopodoj kaj sukcesoj, se iu neinformita entuziasmulo tute bonintence entreprenos ion kontraŭan al la ĝenerala plano. La plej bone kirasita ŝipo povas droni eĉ pro unu eta truo ne rimarkita kaj ne ŝtopita ĝustatempe.

9. 70. en «Granma», oficiala organo de la centra komitato de la Komunista Partio de Kubo. (Eldonkvanto: 327.000 ekz).

USONO. En la universitato de Dyton okazas dum ĉi tiu vintra studperiodo konferenco de universitataj, kiuj parolas E-on. La historia fako de la universitato subvencias la konferencon per 300 us. dol. Organizas ĝin D-ro Richard Wood, Louisiana State University. — Post la apero de artikolo pri Esperanto en la San Mateo lerneja ĵurnalo «Current Events», la E-Infocentro en Kalifornio ricevis informpetojn de pli ol cent lernejoj kaj instruistoj. — Baldaŭ komenciĝos kurso de Esp. en la lernejoj de Highlands, San Mateo, kiel parto de nova eduka eksperimento kun la titolo «Pasporto al la mondo».

ESPERANTO EN GREKUJO

Venis jena telegramo:

«Esperanto jam aprobita de la Administracio de la Tesalonika Universitato. S. H. E. I. (Supera Helena Esperanto-Instituto) komencas oficiale instruadi pere de s-ro Ko-

titsas ekde 16—3—1971, antaŭparolata de s-ro S. Sakelliaropoulos. Helena esperantistaro varme gratulegas mian landan lingvan instancon kiu spite al sia nesufiĉa kaso mantenas la verdfluman torĉon de nia dolĉa lingvo. Kimon Elliopulos»

La redakcio siaflanke kore gratulas pro la sukceso kaj deziras multajn pliajn.

EKSPOZICIO «MILITO KAJ PACO»

En Selm, kaj poste ankaŭ en aliaj urboj de F. R. Germanujo, dum la aŭtuno okazos ekspozicio sub la moto «Milito kaj Paco». En ĝia kadro estos ekspoziciitaj ankaŭ infandegnaĵoj pri la sama temo. La organizaĵoj petas kontribuon de infandegnaĵoj kaj pentraĵoj pri milito (ankaŭ pri la detruaj sekvoj, funebro, mizero) kaj pri paco (vivo en paco kaj interhelpo kaj interkompreniĝo de popoloj). La kontribuoj estas petataj ĝis la fino de julio (kvankam la organizaĵoj ne povas samkvante reciproki, kaj sendos laborojn de germanaj infanoj nur al tiuj kiuj speciale petas), al jena adreso: **HARTMUT WEDERMANN**, Im Ort 5, D-4714 SELM/Westf., F. R. Germanujo.

Pli valora la praktiko ol centhora prediko

ESPERANTISTOJ EN LA FLEGOFAKO

En julio 1970 malfermis la psikiatria kliniko Wil, Svislando, malgrandan stacion, en kiu deĵoras nur E-parolanta personaro. Nuntempe en ĝi laboras 2 svicinoj kaj unu anglo. Ili havas du taskojn: zorgi pri kelkaj pacientoj, due enkonduki E-istojn en la flegofakon. Adreso: Hans Kästli, Esperanto-rondo, Psikiatria Kliniko, CH-9500 WIEL.

Esperanto en la praktiko

Efektivigis nia iniciato interŝanĝi fakajn spertojn pri popoldancado inter bulgara kaj hungara dancgrupoj pere de Esperanto. Dum la Somera Internacia Tendumado de Esperantistaj Pioniroj en Harkány ni okazigis komunan prezentadon de bulgara pionira popoldancgrupo (el Vraca) kaj hungara sindikata popoldancgrupo (el Pécs). La interamikigo sekvinta la sukcesan spektaklon rezultis inviton por la hungaraj dancistoj al Bulgario. La korespondadon, vojaĝplanon ni faris en Esperanto.

Per la subteno de Hungara Sindikato (HVDSZ) la 24-an de oktobro ekveturis al Bulgario 22 junaj amatoraj dancistoj (ĉefe laboristoj) el Pécs por interŝanĝi spertojn pri popoldancado. Ĉe ĉiu stacio de nia vojaĝo atendis kaj helpis nin esperantistoj, kaj aranĝis por ni entuziasmoplenajn akceptojn. Bukedoj de rozolando plenigis niajn brakojn kaj ni estis ornamitaj per ruĝaj pioniraj koltukoj. Varmaj amikaj salutvortoj en Esperanto sonis ĉie. Je afablaj invitoj ni vizitis lernejojn, kie vivigo de amikeco inter la frataj bulgara-hungara popoloj, donacoj kaj prezentadoj okazis je nia honoro, kaj fine sekvis hungaraj popoldancoj prezentitaj de la gastoj, jen por kio ni, esperantistoj aktivadas: interkomprenigo inter popoloj diverslingvaj. En la bankedoj aranĝitaj foje de Distrikta Pionira Domo de Vraca, poste de Junulara Klubo en Sindikato kaj fine de vilaĝa lernejo, Esperanto helpis kiel interkomprenilo kaj ni pruvis eĉ antaŭ nesimpatiantoj, ke nia lingvo taŭgas kaj fakte vivas en internaciaj kontaktoj. Ni dankas tiujn esperantistojn komplezajn, kiuj dumvoje atendis nin en Beogrado, en Sofio kaj en Bukareŝto por helpi nin kaj prezenti al ni la plej valorajn vidindaĵojn de la ĉefurboj. Aparte tutkoran dankon al sekretarino de Distrikta Esperanto-Komitato en Vraca: Sneĵinka Angelova kaj al s-ro Cvetan Todorov koreografo de la bulgara dancgrupo.

La bulgara danckolektivo lernas Esperanton kune kun la koreografo, kaj se niaj hungaraj dancistoj estas diligentaj ankaŭ en la lingvolernado, dum la sekvonta renkontigo ili ja ne bezonos interpretiston. Ni klopo-

EL LA MOVADO

INTERŜANĜA FILATELA CENTRO LAŬNOMBRA

A. RIBOT, 11 Rue Vergne 47
— MARMANDE (Francujo)

Ĉiuj filatelistoj posedas ian nombron da duplikataj poŝtmarkoj (PM-oj) kiujn ili ŝatus interŝanĝi kontraŭ dezirataj PM-oj; nia Interŝanĝa Centro kiu rilatas nur al BONSTATAJ PM-oj, prefere grandformataj, NE TRO KOMUNAJ, povas ebligi tiujn interŝanĝojn al ili. Neniam, la kataloga valoro de la PM-oj estas priatentata, sed nur ilia nombro.

ALIGO KA KOTIZO Unu fojon por ĉiam, la nova aliganto pagas unu kotizon konsistantan el 300 malsamaj uzitaj (aŭ ne) PM-oj de unu aŭ pluraj landoj aŭ PREFERE el KVIN internaciaj respondkuponoj (IRK) (pro doganmalfacilaĵoj por sendado de 300 PM-oj). Tiuj IRK utilos por aĉeti la bezonatajn PM-ojn por la membroj de nia Centro.

FONDINTAJ MEMBROJ. Tiaj estas la membroj, kiuj — por helpi la Interŝanĝan Centron — bonvolas donaci kiel unikan kotizon DUDEK KVIN IRK.

HONORMEMBROJ Tiaj estas la membroj, kiuj — samcele — bonvolas donaci kiel unikan kotizon DEK internaciajn respondkuponojn.

INTERŜANĜOJ Por ĉiu interŝanĝo, la aliginto sendas al la Centro (ĉi supra adreso) 50 aŭ 100 PM-ojn DIVERSAJN KAJ BONSTATAJN, akompanatajn de UNU koverto kun

das ke nia unua iniciato gajnu aliajn kaj ni prezentu Esperanton al tiuj, kiuj havas la eblecon utiligi ĝin en siaj internaciaj kontaktoj.

Elizabeta Pallós

lia plena adreso kaj de UNU IRK por la revenfranko. Li petas interŝanĝe PM-ojn de pluraj landoj laŭ ordo de malkreskanta prefero; laŭ pove, la Centro tuj sendos al li 47 aŭ 95 malsamajn PM-ojn de la dezirataj landoj.



Carma infangrupo dum Zamenhofa Festo en Valasske Meziriĉi, Ĉeĥoslovakio.

RENKONTIGO

En kampadejo »STELO« apud Mediteraneo kaj lago Thau okazos ĉiujare INTERNACIA RENKONTIGO kie ESPERANTO estos la komuna lingvo, de la 1-a ĝis la 15-a de Julio. Loko: BALARUC LES BAINS apud haveno SETE.


Petu informojn de LENTAIGNE, 3, av. de la Gaillarde, 34-MONTPELLIER (aldonu respondkuponon)

FORPASO DE VETERANO

86-jara JULIE ŠUPICHOVA, multjara aktivulo de la Esperanto-movado, konata vaste ekster la limoj de sia lando, Ĉeĥoslovakio, forpasis la 20-an de decembro 1970. Ni aliĝas al la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun niaj sentoj kaj profunda kondolenco. Gloron al ŝi!

La Redakcio

SE NI ĈIUJ STREĈOS
NIAJN FORTOJN, ESPERANTO
NEPREVENI



LANDAJ KOMITATOJ

Laŭ la paragr. 6 de la Statuto de IOE en ĉiu lando povas esti Landa Komitato (Landa Komisiono aŭ komisiito) de IOE — ĝenerala, branĉa aŭ faka, por kumordigi la agadon en la tuta lando.

La laboro de IOE evidente povus esti sukcesa nur se oni samtempe gvidas la samajn kampanjojn en multaj landoj. Tamen por rekta kontakto kun ĉiuj 550 kunlaborantoj (kaj ni esperas ke ankaŭ novaj anoncos sin) ni devus havi grandan administran aparaton en la centro, kiun ni ne havas. Imagu, se ĉiu kunlaboranto nur unu leteron skribus monate, tio postulus 20 respondojn tage, ne kalkulante leterojn de diversaj organizaĵoj kaj aliaj informpetantoj, ktp. Kaj multaj el tiuj respondoj estas longaj leteroj. Do, tia rekta kontakto ne estas ebla, pro tio estas necese havi en ĉiu lando iun komitaton aŭ komisionon aŭ almenaŭ komisiiton, kiel ponton inter la direkcion kaj unuopajn kunlaborantojn.

En diversaj landoj estas diversaj cirkonstancoj kiuj malebligas laboron laŭ iu ŝablono. Pro tio ni devas havi iun landan organon, kiu niajn ideojn, sugestojn kaj planojn adaptus al la cirkonstancoj de la propra lando (leĝaj, geografiaj, politikaj, moralaj, religiaj ktp) kaj tiel diskonigus al la kunlaborantoj.

En iuj landoj la Landa E-Asocio deziras havi kontrolon de laboro de la esperantistoj, aŭ volas influ la kampanjojn gvidatajn, aŭ nur iniciatintajn de IOE. Pro tio niaj landaj komitatoj (por ne menci ĉiujfoje la komisionojn kaj komisiitojn) devas esti en kontakto kun la landa Esperanto-asocio kaj laŭeble en plena harmonio kun ĝi efektivigi la internacie starigitajn programojn.

Jen pro kio ni bezonas landajn komitatojn. Komisionoj estos nur tie kie iun ĝenas la nomo »komitato«.

La plej efika solvo estus, se la landa E-asocio mem elektus landan komitaton de IOE por havi plenan kontrolon super ĝia laboro kaj en konkritaj kampanjoj helpi laŭ siaj ebloj. La komitato de la landa asocio povus esti plej taŭga, se ĝi ne havus multajn organizaĵajn, financajn kaj aliajn problemojn. Tamen, ankaŭ tiu solvo povas kontentigi.

La taskojn de la landa komitato de IOE ni povus resumi jene:

1) Sekvi la programojn, planojn, konsilojn kaj sugestojn de la Direkcion pri la enkonduko de Esperanto en la plej diversajn mediojn.

2) Pridiskuti ilin kaj, se necese, adapti al la landaj cirkonstancoj, kaj — laŭeble post interkonsultigo kun la landa E-asocio — entrepreni ilian efektiviĝon sur la teritorio de la propra lando.

3) Trovi kunlaborantojn en la loko kaj medioj, kie necese organizi lokajn komisionojn, por fari la taskojn surloke, instrukcii ilin kaj kolekti informojn pri ilia laboro kaj sukcesoj.

4) Kontakti la gvidantojn de unuopaj sekcioj kaj komisiitoj de IOE pri konkritaj kampanjoj kaj transpreni la efektiviĝon de iliaj planoj en la propra lando. Preferinde estus se kun ĉiu supre menciita funkcio de IOE rilatas alia membro de la landa komitato.

5) Reprerenti IOE en sia lando en rilatoj kun la ŝtataj organoj, entreprenoj, kaj aliaj neesperantistaj medioj.

6) Informadi la Direkcion pri la laboro, sukcesoj kaj malfacilaĵoj, por eventuala diskonigo, respektive helpo.

7) Sugesti novajn agadojn por kiuj en la propra lando ekzistas favoraj kondiĉoj, por ilia ĝeneraligo.

8) Informadi la nacilingvan gazetaron kaj aliajn informilojn pri la ideoj, laboro kaj atingoj de IOE. En landoj kun tre malmultaj esperantistoj kaj kie la landaj E-asocioj ne deziras miksiĝi en la laboron de aliaj internaciaj E-organoj, sufiĉas provi-

zore landa komisiito enstataŭ, komitato, sed la komisiito inter aliaj taskoj devas zorgi ankaŭ pri plinombro de la esperantistoj por krei komitaton.

La landaj komitatoj, almenaŭ komence, ne povas kalkuli pri monhelpo de la Direkcion, ĉar ankaŭ ĝi laboras senpage kaj trovas mem la rimedojn por kovri la elspezojn, do ili devas labori sen salajro, libervole, kaj eĉ mem iel kovri la etajn elspezojn. Rekomendinde estas fariĝi samtempe perantoj de Esperanto-Gazeto kaj vendado de diversaj varoj pri kiuj IOE disponas (mondmapo, emajlita insigno, gluinsigno kaj tolininsigno »Esperanto parolata«, emajlita insigno »Amiko de Esperanto«, aerpoŝtaj glumarkoj, Esperantaj gramofondiskoj ktp), ĉar la 20%-a rabato por ĉio menciita povas eĉ komplete solvi tiun problemon. Kompreninde tio validas nur por landoj el kiuj mono estas sendebla. Se ekzistas ebleco, la landa komitato povas okupiĝi ankaŭ pri produktado de diversaj varoj por IOE, kaj per tio ion profiti.

KIE ESTAS JAM STARIGITAJ LANDAJ KOMITATOJ

1) Aŭstria Esperanto-Movado, Hofburg, Batthyanystrasse, A-1014 Wien, samtempe funkcias kiel Landa Komitato de IOE por Aŭstrujo.

2) Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato samtempe funkcias kiel Landa Komitato de IOE por Rumanujo. Prezidanto: Jozefo Petrin, str. Putul de piatra 10, Bucuresti; ĝen. sekretario: Maria Vitályos, C. postala 14, Tirgu Secuiesc, jud. Covasna.

3) Landa Komitato de IOE por Novzelando. Sekretario: Lawrence Southon, 187 Frazer St., Tauranga.

4) Landa Komitato de IOE por Pollando-Prezidanto: Tyburcjusz Tyblewski, Bartka Zwyciezcy 11/1 Jelenia Góra.

Komisiitoj de IOE kiuj transprenis la taskon iniciati landaj komitatoj:

5) Ĉilio: Alfonso Baraona, Casilla 13828, Santiago.

6) Kolumbio: Miguel Pérez González, Carrera 15 No 85-37, Apartamento 501, Bogotá.

7) Madagaskaro: Eugène Ravelson, Biot Postale 1678, Tananarivo.

8) Sovetio: Boris Ĉeĉetko, Zaharova 69-17, Minsk 22. Pliajn sinacojn ni atendas.


ĈU VI JAM REABONIS?

IMITINDA ŜANĜO EN LA INFORMADO

GEMANA ESPERANTO-REVUO, kiu ĝis nun estis dulingva kiel la plimulto de organoj de la landaj E-asocioj — komence de ĉi tiu jaro aperas nur en Esperanto, 8 fojojn jare. Por informado de la neesperantistoj aperas aparta germanlingva informilo »Esperanto aktuell« 4 fojojn jare.

Tio estas la ĝusta solvo, ĉar en dulingva revuo la neesperantistoj ne komprenas la Esperantajn tekstojn, tamen pagas ilin, kaj la alilandaj esperantistoj ne komprenas la nacilingvajn tekstojn, kvankam ankaŭ tion ili devas pagi. Pro tio malmultaj eksterlandanoj abonas tiajn revuojn, ili havas malgrandan eldonkvanton, sekve tro altan prezon.

Ni esperas ke la nova Germana Esperanto-Revuo trovos multajn novajn abonantojn eksterlande kaj montrus la ĝustan vojon ankaŭ al aliaj revuoj.



Kiel filmisto mi travivis dum mia laboro multajn strangajn aventurojn kaj renkontigojn. Tamen, iu el la plej ekscitaj travivaĵoj estis la filmado de la kurioza besto sur la insulo Komodo, kiun oni nomas Varano kaj kiu estas fakte unika restaĵo de iamaj teruraj reptilioj tiranosauroj kiuj okupis nian planedon dum prahistoria epoko.

La hodiaŭa varano estas alta proksimume unu metron kaj duono, kaj longa ĝis tri metroj. Ĝi nutras sin per bestkadavraĵoj verŝajne pro tio ĉar ĝi mem ne povas ĉasi, ĉar ĝi malrapide kaj mallerte moviĝas. Tio estas feliĉa cirkonstanco, ĉar kio okazus se tiu giganto en kies buŝego troviĝas 26 longaj, akraj dentoj, kuregus post sia viktimo per rapideco de iu apro.

BENITA MALRAPIDECO

Fosilaj restaĵoj de tiuspecaj reptilioj estas trovitaj sur aŭstralia kontinento kaj insuloj de Oceanio. Vivaj gigantaj varanoj hodiaŭ ekzistas nur kelkaj centoj da ekzempleroj, nur sur la insulo Komodo kaj sur iuj najbaraj nelogitaj insuloj.

Ni decidis tuj, ĉar ni planis viziti Borneon — iri ankaŭ al Komodo kaj serĉi tie la ŝancon filmi tiujn monstrojn.

Sed, la malfacilaĵoj jam komenĉiĝis je tiu momento kiam ni provis sur la mondmapo trovi tiun insulon. Ĝi estis tiel eta kaj ni apenaŭ rimarkis ĝin dum ni streĉe esploradis la mondmapon laŭ la direkto: Sumatro, Javo, Balio, Lomboko, Sumbavo, Sumbo kaj Floreso. Komodo estis, iom norde de Floreso.

Post plurtaga vojaĝo per malgranda ŝarĝosipo ni atingis fine Labuan — Baĝon, la fiŝhavenon vid-al-vide de la insulo Komodo. Sed, kiel ĝin atingi? La indiĝenoj-fiŝistoj nevolonte respondadis al demandoj pri tiu ĉi dezerta insulo pri kiu ĉi tie cirkulis diversaj historioj. Ni jam ekdubis ĉu ni iam ĝin atingos, kiam iun tagon aperis iu fiŝista grupo. Ĝi iris al tiu direkto kaj proponis sin transporti nin al Komodo, sub la kondiĉo ke ni por ĝi mortigu dek bubalojn, kiuj vivas sur la insulo. Alie ili ne irus al Komodo, sed ĉi tiun jaron la rizrikolto estis tre malriĉa, fiŝoj estas malpli ol aliajn jarojn kaj tre malfacile ili povas nutri sin.

Post mallonga meditado ni konsentis.

DRAKO DE LA INSULO KOMODO

EN LA GOLFO DE KROKODILOJ

La morgaŭan vesperon, post trihora veturado per longa fiŝista boato, ni atingis la tiel deziratan Komodon.

Kiam ni albordigis kaj elboatis niajn kestojn, la fiŝistoj tuj forlasis nin. La kialon de ilia hasto ni rapide malkovris. Ĝi estis iu valetto plena je krokodiloj, marĉaj birdoj, ranoj kaj kuloj. Tiun nokton ni pasigis provadante per reto ŝirmi nin kontraŭ la tedegaj kuloj.

Kiam tagiĝis, antaŭ niaj okuloj montriĝis malbela vidaĵo: marĉo, arbustaro, insektoj. Apenaŭ ni trovis iun pli konvenan lokon por starigi tendojn.

Proksimume je la oka mi turniĝis kaj — rigidiĝis. Dek kvin metrojn de mi kaŭris sur la malantaŭaj gamboj kaj kvazaŭ observis nin giganta lacerto, vera Varanus Komodoensis. Unuavide, ĝi ne ŝajnis al mi pli longa ol du metroj.

Ni staris tiel kelkajn sekundojn, mutaj kaj rigidaj, ni ekspediciuloj kaj la bestego — tiam la varano malrapide levigis kaj ekpaŝis al la loko kie la suno pli forte varmigas. Ni rapidegis al la kestoj kie estis niaj kameroj sed la bestego malrapide malaperis en la arbustaron. Ni vidis nur le malantaŭan parton de la trunko kaj la gigantan dikkan voston.

Ni konkludis ke ni la tendon starigis proksime de la vojo laŭ kiu la besto ĉiutage pasadis. Tio poste konfirmiĝis: dum tri monatoj kaj duono, kiom ni restadis sur la insulo, la besto ĉiun matenon trairis la saman vojon, per malviglaj paŝoj dediĉante al ni neniun atenton.

La sekvantajn kelkajn tagojn ni atente esploris ĉiujn spurojn kaj vojojn laŭ kiuj tiuj bestoj iras. Estis tre malfacile kaj elĉerpige marŝi tra alta herbaro en kiu kaŝis sin serpentoj, aproj, makaki-simioj, kakadu-papagoj, bubaloj, kaj

amaso da aliaj bestoj. Estis tio unika loko de virga naturo en kiu la vivo marŝis laŭ pratempaj leĝoj. Sed la varanon ni rimarkadis nur de tempo al tempo, de malproksime, nur ĝian vostopinton aŭ kapon.

Renkontigoj de proksime

Fine ni faris planon. En iu sablea valo, je unu hora marŝado de nia tendaro ni elfosis tranĉeon kaj konstruis iun specon de subterejo, kiel dum milito.

Supre ni kovris la tranĉeon per herbarpecoj starigante nur malfermajojn tra kiuj ni intencis traŝovi la objektivon de la kamero. En la subterejon ni alportis nutraĵojn, municion, librojn, magnetofonojn, kaj ekipis ĝin tiel ke ni povu resti en embusko senĉese po 12 horoj atendante ke la varano aperu.

Ne malproksime de la subterejo ni starigis logaĵon, iun mortigitan cervon. Baldaŭ de ĝi komenciĝis malagrabra haladzo. Ni ne atendis longe ke la varano aperu.

La vidaĵo estis interesa sed terura. Kiam oni observas kiel iu varano mangas — kvazaŭ oni revenus al la prahistorio. Ĝi unue fendis la beston kaj enŝovis sian kapon en ĝian internajon. Unue ĝi formangis la internajon, kaj poste la ceterajn partojn de la korpo. De tempo al tempo ĝi frande liplekadis — montrante sian disbranĉan langon, rugan kiel flamo. Tiam mi ekpensis ke certe tia vidaĵo persvadis la homojn dum malnovaj tempoj krei fabelojn pri drakoj kiuj blovas fajron.

Tiranosauro — al kiu similas varano, karnomangulo, longa 14, alta eĉ ĝis 10 metroj kaj peza proksimume 10 tunojn. La dentoj estis longaj proksimume 15 centimetrojn. Ĉi tiuj gigantaj bestoj formortis antaŭ 70 milionoj da jaroj kaj el ili restis nur fosilaj restaĵoj.



Ni ĝin ne interesis

La varano malrapide mangis kaj fine de la cervo restis eĉ ne unu peceto. Dum la tuta tempo mi atente filmadis ĉiun ĝian movon. Kiam ĝi finis sian tagmanĝon, la besto turniĝis kaj preterpaŝis malrapide je duonmetra distanco de ni. Ni troviĝis kun ĝi »vizaĝo al vizaĝo«. Mi traŝovis mian kapon el la tranĉeo ke mi pli bone filmu ĝin de proksime. La besto verŝajne ne vidis min, aŭ eble ni interesis ĝin nek kiel rabajo nek kiel danĝero, pro tio ĝi trankvile preterpaŝis kaj malaperis en la arbustaro.

La morgaŭan tagon ni starigis la logaĵon nur je tri metra distanco de la objektivo. La besto venis kaj apete formangis sian tarmanĝon kaj mi povis de la plej senpera proksimeco filmi ĝiajn grandegajn piedojn kun ungegoj, ĝian disbranĉan langon kaj skvamecan haŭton sur ĝia dorso.

La filmado daŭris plurajn tagojn. Estis terure ĉar la vidaĵo estis tre malagrabra kaj la malbonodoro netolerebla. Ĉiuj ni perdis la apetiton. Sed la filmon ni devis finfari. Ni filmadis iam la tutajn tagojn kaj malfrue vespere ni revenadis al la tendaro kie oni ankaŭ sentadis la malbonodoron de la bestaj kadavroj.

Kiam la fiŝistoj denove nin vizitis, ni interkonsentis pri la dato de nia reveno al ilia insulo. Ĉar ni devis plenumi la promeson kiun ni donis — mortigi dek bubalojn kiel rekompenccon por la veturigado.

La reveno estis por ni ĝoja ekscito. Ni spiris per plena pulmo la maran aeron sen malbonodoro. Ni portis multvalorajn filmojn kiujn ni el Ĝakarto sendos retke al Parizo.

Tradukis: Zagego

Esperanto en Internaciajn Kongresojn kaj Konferencojn

IOE jam delonge planis agi en la medio de internaciaj kongresoj kaj konferencoj, kaj efektive jam faris kelkajn paŝojn. Estas tamen nun mia tasko skizi iom pli amplekse planon por tiu agado. Tute certe multaj esperantistoj ne konsentos pri la ĉi-subaj personaj ideoj. Mi ĝojos se ili povos pruvi (ne aserti nur) ke miaj ideoj estas tro modestaj.

Instruo de antaŭaj klopodoj.

Kiel en multaj terenoj de agado por Esperanto, ankaŭ ĉi tie la tasko ne estas facila. Internaciaj konferencoj kutime uzas kelkajn grandajn lingvojn kun interpretado. Ĝenerale tiu sistemo ne estas kontentiga: la interpretado ne povas anstataŭi la originalan paroladon, ĝi estas multkosta kaj malfacila, ofte malbonkvalita. La plimulto de la partoprenantoj ĝenerale uzas la anglan lingvon; la uzo de aliaj grandaj lingvoj (franca, rusa, germana, hispana) malgraŭ oficiala samrajteco tamen postlomas. En personaj interparoloj, do sen helpo de interpretistoj, la denaske-parolantoj de la angla havas avantaĝon super aliaj — do tutsimple regas la situacion kiam ni esperantistoj konas jam bone kaj malŝatas. Ne estas fabelo ke la interkomunikado en internaciaj konferencoj suferas gravajn malhelpojn pro la lingva diverseco, eĉ se la plimulto de la homoj «scias siajn lingvojn» (ĉiam pli kaj pli bone), kaj eĉ se funkcias interpretistoj. Parenthese: en la junularaj medioj jam tute nature oni uzas la anglan kiel solan lingvon. Tiu kiu vizitis ekz. la junularan kongreson apud la Dua Tutmonda Kongreso pri Nutrado, de Fao, en Hago, Nederlando, en la somero de 1970, povis tie vidi belan ekzemplon de multnacia komunumo vivanta nur en la usona lingvo.

Ni devas tamen konstati samtempe, ke ŝajne nur esperantistoj rimarkas tiujn malhelpojn de lingva diverseco. Neniu grava, ĝenerala protesto iam leviĝis kontraŭ tiu situacion. Ĝi ne estas laŭ la ĝenerala sento grava malhelpo. Ni povas do baziĝi niajn pledojn por Esperanto centfoje sur la malavantaĝoj kiujn ni vidas en tiu situacion, sed neniu aŭskultas tiujn pledojn, ĉar neniu alia krom ni vidas problemon solvendan tiurilate.

Tio ne validas nur por konferencoj, sed por multaj aliaj internaciaj kontaktoj: turismo, korespondado, asocioj, ktp. Sed en konferencoj aldoniĝas plia faktoro specifa: se homoj lernas esperanton, ili povus uzi ĝin nur dum la tagoj de la konferenco. La ŝanco ke ili refoje povos uzi ĝin en aliaj konferencoj (se ili jam regule partoprenas konferencojn entute) estas malgranda.

Ne mirige do, ke la klopodoj enkonduki Esperanton en internaciajn konferencojn ĝis nun neniam sukcesis konstante kaj vastskale. Antaŭ la dua mondmilito kelkaj internaciaj asocioj pritraktis la utiligon de Esperanto en siaj konferencoj (pri tio raportas interesega libro de Shenton, jam malnovdata), kaj eĉ, en kelkaj kazoj decidis fari la eksperimenton. Ĉiam rezultis, ke la konferencanoj simple ne obeis la prenitajn decidojn, kaj ne lernis la lingvon antaŭ ol veni al la konferenco. Tiel ĉiuj klopodoj fiakis.

Pli freŝdate la Skolta Esperantista Ligo havigas al ni kelkajn interesajn spertojn. En jamboreo de Essex (Britujo), somero 1969, oni dank' al la persona favoro kaj fervoro de la ĉeforganizanto Tom Parinder, uzis Esperanton krom la angla kiel oficialan lingvon. Laboris tie tre kompetenta grupeto de spertaj esperantistoj, kaj ankaŭ al la kurso surloka aliĝis kelkdek da knaboj. Tamen praktike Esperanto servis kiel komunikilo nur tre malofte kvankam kompreneble la principa rekono havis gravan valoron.

Nuntempe SEL relative sukcese preparas skoltajn por la jamboreo en Tokio, en 1971. La preparoj aŭguras bone; se el tio rezultos iom konsiderinda uzo de Esperanto en tiu ĉi jamboreo kaj en sekvontaj, la unuaj sukceso estos mirakle kreita.

Ĉu tamen ekzistas maniero?

Oni povus malesperi pri ĝenerala enkonduko de Esperanto en konferencojn. Vojo certe nekonvena estas alpaŝi organizantojn de konferencoj kaj proponi la uzon de la internacia lingvo. Oni povus kalkuli nur pri rifuzoj.

La sola kazo en kiu oni povas esperi je sukceso, kondiĉe ke oni trovas racieman organizanton kaj maltradiceman publikon, estas — laŭ mia espero — konferencoj kiu regule ripetiĝas, kaj estas vizitataj de proksimume la samaj homoj, kaj tamen sentas lingvajn malfacilaĵojn. Tiam oni povus argumenti ke, lerninte Esperanton, la regulaj partoprenantoj utiligos Esperanton ĉiam denove, kaj tiumaniere la investita lernado donos sufiĉe grandan rekompencan. La lernado tiam valoros la penon. Serĉi tiajn situacionojn ne estas facila: oni devos laŭeble objektive (eble eĉ per mezuriloj) pruvi ke lernado de Esperanto pli valoros ol plia stumblado per la angla kaj aliaj lingvoj.

Kaj eĉ tiam — homoj ne estas ĉiam raciaj estaĵoj. Ili reagis nek tute racie, nek tute emocie. Se la ideo de internacia lingvo plaĉos al ili pro iu aŭ alia sento, ili estos iom pretrevidi statistikajn kaj objektivajn ciferojn. Se ili gustumas, aŭdante la vorton »Esperanto«, iun

malnovmodan fanatikan sekton, ili trovos la argumentojn por rebati kiun ajn pruvon pri la avantaĝoj de tiu lingvo.

Se mi, starante nun antaŭ la tasko ie ajn komenci, devas elekti, mi komencas prepari la ilojn necesajn por pruvi ke Esperanto en tiu aŭ alia specifa situacion estas pli racia (mon- kaj tempŝpara) ol la angla. Kiam tiuj iloj estos pretaj venos la tempo elekti kelkajn asociojn kaj konduki enketon (esploron) ĉe ili por elprovi la metodon.


Post tio ni estos pretaj alfronti aliajn asociojn. Ilin ni ataku kaj per pruvoj racie nerefuteblaj, kaj per emocie konvinkaj argumentoj. Ĝis nun tio neniam okazis: oni ĉiam konvinkis per argumentado, kaj anstataŭis pruvon per laŭdira evidenco de la solvo. Mi ne kuragigas aserti ke objektivaj pruvoj donos al ni decidan armilon. Bona kaj lerta argumentanto atingos pli ol malforta sciencisto. Sed argumentado kaj scienco, man-en-mane eble estas ideala kombino.

Estas alia avantaĝo de bona metodo per kiu oni objektive esploras la avantaĝon de Esperanto en iu konferencano situacion. Nome — ke la metodo direktos nin al tiuj situacionoj kie ni efektive havas ŝancon je sukceso. La metodo selektigos al ni la plej fekundajn terenojn, kaj evitigos ke ni ataku situacionojn kie Esperanto principe havas malmultan utilon.

Plano.

Resume, mi antaŭvidas la estontan agadon jene:
Dum 1971: ellaboro de la ilaro.
Dum 1972: kelkaj provoj por ĝi.
Pli poste: pli larĝa utiligo.
Dumtempe: lerni el spertoj de aliaj agantoj ĉi-terene. Adaptiĝi laŭ iliaj rezultoj. Subteni ilin kie eble, eĉ se mi persone ne multe kredas pri sukceso. En Amsterdam ni disponas pri kalendaroj de konferencoj ĉie en la mondo, pri statistikoj, pri kelkaj libroj. Se vi volas ilin konsulti, mi respondos laŭeble bone.

H. Bakker



— Mi gratulas! Estas knabo.
— Ĉu esperantisto?

Nürnberg — urbo de Dürer kaj Esperanto

En la jaro 1971 la mondo festas la 500-an datrevenon de la maskigo de Albrecht Dürer en Nürnberg.

»La evento de nacia reprezentado«, kiel nomas ĝin profesoro Carlo Schmid, estu stampita nek de tradiciaj festoj nek de festivalaj misfornoj. La urbo volas honori sian plej eminentan filon per tio, ke ĝi metas la konscion pri la krea forto de la nuntempo apud la memoron pri li kaj lia universala intelekto; ke ĝi same akcentas la epokan spiriton kiel la germanan kontribuon al la eŭropa kulturo.

Tamen en la Dürer-Jaro 1971 la urbo Nürnberg ankaŭ ekkonas sian unikan ŝancon, doni novan gloron al sia nomo kiel Dürer-urbo kaj per tio kiel tradicia eŭropa kulturcentro en la tuta mondo. Nürnberg ne volas forgesi, ke iam ĝi fifamiĝis kiel »urbo de la regnaj partitagoj« aŭ »unu el la estintaj citadeloj de la naziismo«, kiel oni povas legi pri Nürnberg en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Sed Nürnberg volas pruvi, ke ĉi tiu rolo estis altrudita al ĝi kaj ĝiaj homoj. Nürnberg de hodiaŭ sentas sin ligita en siaj pensoj kaj agoj al sia glora pasinteco, al pasinteco de urbo kun internacia spirito kaj gastamaj, toleremaj homoj.

Estis civitanoj de Nürnberg, kiu fondis en la jaro 1888 la unuan Esperanto-grupon de la mondo. Leopold Einstein, ĵurnalisto el Nürnberg, pri kiu Zamenhof skribis, ke li »donis antaŭpuŝon al nia afero en Germanujo«, verkis kaj publikiĝis la unuajn germanlingvajn broŝurojn pri La Lingvo Internacia. Hugo Barbeck, Christian Schmidt kaj Joseph Gagel, ĉiuj el Nürnberg, fondis en 1889 la unuan Esperantogazeton »La Esperantisto«, kaj la presejo W. Tümmel, Nürnberg, prezigis la unuajn literaturajn verkojn en Esperanto sub la titolo »Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto«, eldonita de Zamenhof.

PRI ESPERANTO-LIBROMERKATO

S-ro B. D. Kaneen, asistanta profesoro de Simon Fraser Universitato en Kanado skribis al la eldonejo de Ludwig Pickel, Nürnbergo:

»Kiel libromendanto por nia universitata sekcio pri modernaj lingvoj mi ofte havas la okazon mendi librojn el fremdaj landoj. Kvankam mi bone scias, ke la nomita libro de Wüster: **Die Verhältnisswörter de Esperanto** estas facile havebla aŭ per via libroservo aŭ per UEA, mi ĉi-foje lasis al la universitataj bibliotekistoj mendi ĝin pere de la kutimaj perantoj. Jen kio okazas tro ofte, kiam temas pri libroj en aŭ pri Esperanto! La Vereinigte Universitäts- u. Fach-Buchhandlung resendis la mendilon: Eldonisto Iltis nekonata en Saarbrücken.

Ĉu eble vi povus sendi al tiu libroservo en Kolonjo ekzempleron aŭ de via propra librolisto aŭ de tiu de UEA? Ĉu ne valorus iomete plugi ankaŭ tiun agadkampon? Mi opinias, ke ni eble tro ofte aĉetas nur pere de miaj movadaj libroservoj.

Al tio s-ro Pickel en PILO-PRESS aldonas: »Kvankam por nefakuloj tiu problemoj ŝajnas esti facile

Varsovio estas la maskigurbo de Esperanto. La lulilo de Esperanto tamen staris en Nürnberg. Kaj dank' al la universala spirito, al la toleremo kaj entreprenemo, kiuj ĉiam regas civitanojn de tiu urbo, prosperis ĉi tie la lingvo kaj ideo Esperanto. Kulmino de tiu Esperanto-agado estis en la jaro 1923, kiam en Nürnberg okazis la 15-a Universala Kongreso de Esperanto kun 4.963 partoprenantoj. Kaj profesiaj geaktoroj de la Urba Teatro Nürnberg, ludis en Esperanto la dramecan poemon »Natan la Saĝulo« antaŭ la internacia kongresa publiko. Kaj tiu internacia kongreso sentis sin ligita al »granda germana Majstro« Albrecht Dürer. Tiu spirita ligiteco manifestiĝis en granda ovacio al la artisto antaŭ lia monumento en Nürnberg, kie d-ro K. Kalocsay, Budapeŝt, parolis »pri la nobla karaktero de la granda majstro«.

Ankaŭ hodiaŭ Nürnberg estas grava centro de la internacia lingvo Esperanto, de kie eliras impulsoj en la tutan mondon: Germana Esperanto-Revuo, Internacia Pedagogia Revuo, PILO-PRESS kaj aliaj. Ne estas do, arogo aŭ hazardo, se mi ligas nian 49-an Germanan Esperanto-Kongreson sub la titolo »Esperanto — ponto al naciaj kulturoj« al la Dürer-Jaro 1971.

Nürnberg invitas vin — al Dürer-Jaro kaj Esperanto-Kongreso.

Ludwig Pickel

ESPERMENSO DISVASTIGAS

Karakterizo de la unua jaro de la nova Esperanta organizaĵo Espermenso estis konstanta kresko. Kiam informo pri la societo unue aperis en Esperanto-Gazeto lastan someron estis nur 29 membroj. Nunmomente estas 54 membroj en naŭ landoj.

Lastatempe alvenas informpetoj el kelkaj orientaj eŭropaj landoj kaj Espermenso ŝatus akiri membrojn tie.

La Komitato de UEA ĉe la kongreso en Vieno donis oficialan rekono al Espermenso kiel kunlaboranta fakasocio. Ĝi ankaŭ estas

oficiala SIG-o (special-interes-grupo) de Mensa Internacia. Pro tio oni devas unue esti membro de Mensa mem por membriĝi en la nova Esperanta fakgrupo.

Inter la celoj de Espermenso estas la disvastigado de Esperanto inter Mensa-anoj kun la fina celo akceptigi Esperanton kiel unu el la oficialaj lingvoj de Mensa.

Espermensanoj ĝuas duoblan samideanecon pro partopreno en laboro por du idealoj: la tutmonda rekono de Esperanto kiel internacia lingvo kaj la pli efika uzo de la homa intelekto por la bono de homaro.

Tiu lasta estas unu el la celoj de Mensa kiu enlasas kiel membrojn nur tiujn kiuj posedas altan inteligentecon (pruvitan per formala testo). Pli precize, la minimumo estas inteligentokvociendo de 132 laŭ la skalo de Stanford-Binet, aŭ ties ekvivalento.

Antaŭ nelonge presigis faldfolio en Esperanto pri Mensa kaj tri-lingva faldfolio (Esperanta, angla, franca) pri Espermenso. Tiujn oni povas havigi per peto al la prezidanto, Philip W. Trubey 827 Thornedale Drive, OTTAWA 10, Kanado aŭ la sekretario, Harry J. Lewis, Box 1322 North P. O., HALIFAX N. S., Kanado.

Programo »Pasporto«

Programo »Pasporto« — internacia interŝanĝo de individuoj kaj familioj — oficiala arango de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo — oferas la eblon viziti 20 landojn (inter ili Anglujon, Brazilon, Francujon, Hispanujon, Irakon, Japanujon, Usonon) ne kiel simpla turistoj, sed kiel membro de familio, de unu monato ĝis unu jaro. La sola postulo estas la kono de la internacia lingvo. Kunlaboro de ĉiuj esperantistoj estas dezirata. Klarigan broŝuron sendas senpage D-ro R. Feldman González, CC 64, S.M. Andes, Neuquén, Argentino.

12 argentinaj ĵurnaloj publikigis informojn pri la arango »Pasporto«.

solvebla per simpla mendado de libro en la librovendejoj, tamen mi opinias, ke la Esperanto-libromerkato ne estas ankoraŭ matura por tio. La plej multaj E-eldonejoj ne troviĝas en la katalogoj, ili ne laboras laŭ profesiaj principoj, ja kelkaj eĉ iun fantazian nomon portas. Sed la plej granda obstaklo estas la financa problemoj, la revendiŝta rabato! Mia konsilo: Aĉetu viajn librojn ĉe la E-libroservoj!

Ni, kontraŭe, opinias ke ni povus organizite solvi tiun problemon, eĉ estus preferinde uzi la kutiman libromerkaton ankaŭ por la Esperantaj libroj, ĉar per tio ni diskonigus nian ekziston. Kompreneble ni devus organizite alpaŝi tiun kampanjon, instigante la esperantistojn mendi Esperantajn librojn pere de elektitaj librovendejoj. Eble ĝuste s-ro Pickel, konata kiel tre entreprenema esperantisto, povus gvidi tiun kampanjon. Se ne, bonvolu sin anonci persono kiu pretus ĝin gvidi aŭ helpi. Aliflanke IOE povas aperigi en »Paperkanonoj« liston de ĉefaj librovendejoj de kiuj oni mendu librojn. Pro tio ni petas informojn pri gravaj librovendejoj de diversaj landoj kun plenaj adresoj.

ESPERANTO, INSTRULINGVO EN UNIVERSITATAJ KURSOJ

En la disvolvigo de lingvo, kulturo aŭ ideo la rolo de universitatoj ĉiam estis grandega. Ekzemploj pri tio certe abundas. Sufiĉas legi kion la flandra sociologo Lodewijk de Raet siatempe en 1891 skribis romantike kiam li pledis por flandra universitato (tradukita teksto): »Jen la granda rolo de universitato ĉe ĉiuj popoloj. Kiam Karolo IV, imperiestro de Germanujo, volis germanigi Bohemion, kiu en lia pensado devis troviĝi en la gvida pozicio de Germanujo, li fondis en 1348 la universitaton de Prago. Kiam Anglujo volis fortigi sian povadon en Normandio, ĝi starigis la universitaton de Caen (1436). Kiam Hispanujo volis sekurigi sian supremacion super la Malaltaj Landoj, ĝi fondis la universitaton de Douai (1572)... Kiam Prusujo volis restarigi sin post la katastrofo de Jena, kion ĝi faris? Prusujo fondis la universitaton de Berlino (1810).«

Tia pledo de Lodewijk de Raet kondukis al larĝa movado inter la flandroj. Post pluraj vanaj klopodoj estigis, kelkajn jardekojn poste, la flandra universitato de Gento. La influo de tiu universitato en la posta flandra movado estis tiel granda ke nuntempe, danke al ĝi kaj al la aliaj flandraj postekreitaj universitatoj, la flandra lingva problemo grandparte solviĝis.

Ĉu io simila povus ekzisti ankaŭ en la Esperanto-movado? Certe.

Klopodoj en tiu senco cetere jam ekzistis en la komenco de ĉi tiu jarcento. Unu el la pioniroj de la Esperanto-movado, Edmond Privat, komprenis la grandegan valoron de esperantlingva universitato kaj li atingis en 1908 ke okazu dusemajna kurso en usona someruniversitato. En 1920 en Bruselo okazis diverslingva Internacia Universitato kaj en ĝi estis kelkaj prelegoj en Esperanto; sed tiu iniciato malaperis poste. De 1925 en preskaŭ ĉiu Universala Kongreso de Esperanto ekzistas aro da prelegoj, kiun oni iom pompe nomas »Internacia Somera Universitato«; tiu de 1925 vere okazis en la universitato de Genevo, sed la postaj ĝenerale en la kongresejo mem, kaj ĝia kvalito kelkfoje estis kaŭzo de kritikoj. Ankaŭ de 1963 en la hungara urbo Gyula okazas ĉiusomere aro de prelegoj al kiu oni atribuas la nomon »Somera Esperanto-Universitato«.

La rezulto de tiuj »universitatoj« povas esti nek subtaksata nek super-taksata. Certe ili kontribuis al la programo kaj al la prestiĝo de la kongresoj, al la evoluo de la lingvo kaj al la ĝenerala plialtigo de la kultura nivelo de personoj kiuj konas la lingvon Esperanto. Sed la manko de kohero inter la programoj, la manko de rilato kun iu ekzistanta universitato kaj la manko de ekzamenoj kaj de diplomoj ĝis nun ne donis iun veran signifon al tiuj iniciatoj.

Multaj personoj jam delonge komprenis la valoron de pli veraj universitataj aranĝoj. Unu el ili estis sinjoro Stein, siatempe urbestro de Mainz. En 1958 li prezidis la 43-an Universalan Kongreson de Esperanto kaj tiam li decidis disponigi kastelon de sia urbo por tie starigi esperantlingvan universitaton. Estas ege bedaŭrinde ke Universalas Esperanto-Asocio ne plene atentis pri tiu ĉi unika propono; oni nur iom pristudis la problemon kaj poste forgesis ĝin. Kun ĉagreno sinjoro Stein devis konstati la mankon de intereso por tia propono kaj li devis poste cedi la kastelon por alia celo.

En 1962 en la kadro de la 47a Universalas Kongreso de Esperanto en Kopenhago okazis Konferenco de sciencistoj pri la Lingva Problemo en la Sciencoj. Ankaŭ tie la ebleco de universitato aŭ de someraj universitataj kursoj estis serioze pridiskutata. Formiĝis komisiono kiu okupis sin pri la problemoj. Sed baldaŭ evidentigis malinterkonsento pri la sekvota vojo kaj la komisiono iom lamigis. La intereso pri la afero tamen restis ĉe la Internacia Scienca Asocio Esperantista, kiu plurfoje revenis al la problemoj. Kaj, iom neatendite, la ideo ricevis novan impulson en 1969 pro la interveno de kelkaj junuloj.

Tio kondukis al nova iniciato, kiu nun jam montriĝas tre promesplena kaj kiu jam aliris la simpation kaj la subtenon de pluraj sciencistoj el la Esperanto-movado. La unua kiu publike subtenis ĝin, estas profesoro Paul Neergaard, prezidinto de la supre nomita Konferenco pri la Lingva Problemo en la Sciencoj, direktoro de la Dana Instituto por Sempatologio por Evolulandoj kaj estinta profesoro de la Universitato de Bejrut. Dum la Internacia Somera Universitato de la 55a Universalas Kongreso de Esperanto en Vieno en aŭgusto 1970 li prelegis pri la temo: »Universitato kun Esperanto kiel Instrulingo« kaj li laŭdis la novan projekton kiel realisman solvon. Je la sama tago kunsidis dudeko da kvalifitaj personoj por pridiskuti tion kaj ili ĉiuj decidis aprobi la iniciaton kaj komisiis la iniciatintojn daŭrigi laŭ la entreprenita vojo. Kelkajn tagojn poste en Ternitz (Aŭstrujo) la direkto de la Instituto por Oficialigo de Esperanto ankaŭ decidis subteni la projekton.

Pri kio do temas? Pri la ideo starigi somerajn universitatajn kursojn dum pluraj semajnoj de la somerperiodo en iu facile atingebla loko de okcidenta Eŭropo kun kelkaj koheraj programoj kaj kun ebleco de ekzamenoj, ĉio tio ekde la jaro 1972.

La preparoj pri tio intente jam bonege evoluis. La Universitato de Lieĝo (Belgiujo) decidis disponigi la lekciejojn kaj studentajn domojn de la modernega kampuso de Sart-


Tilman por tiu celo. Prezidanto de la Organiza Komitato estas la bone konata emerita profesoro pri pedagogio, prof. E. Natalis. La kvar aliaj komitatanoj apartenas al tri nacioj, al tri diversaj lingvoj, al tri diversaj agoklasoj, al tri diversaj studdirektoj, al disaj direktoj de la Esperanto-movado; du inter ili apartenas al belgaj universitatoj. Financa subteno jam envenis de pluraj direktoj. Pluraj universitataj docentoj jam anoncis sin por prelegi kaj aliaj nun estas kontaktataj.

En 1972 oni komencos per nur du studdirektoj: lingvistiko kaj medicinaj sciencoj; en la sekvontaj jaroj la studdirektoj supozeble iĝos pli multnombraj depende de la sukceso de la 1972-kursoj. Ĉiu kurso okupos unu semajnon kaj estos akompanata de praktikaj kursoj. Kromkursoj okazos samtempe. La kursoj sinsekvos dum tri semajnoj, de la 30a de julio ĝis la 20a de aŭgusto 1972. Sekvos poste semajno de studado kaj de ekzamenoj. Tamen neniu devas senti sin devigata ĉeesti la tuton; ankaŭ partopreno dum unu aŭ du semajnoj estos ebla. Ĉiu partoprenanto loĝos en komforta studenta ĉambro; ekzistos specialaj aranĝoj por geedzaj paroj. Tamen povas partopreni nur personoj sub 40-jara aĝo, finintaj mezgradan instruadon (krom permeseblaj esceptoj), — tio ĉar la tuta aranĝo devos speciale servi por la ĝejnuloj.

Por pliaj informoj oni jam de nun povas turni sin al la adreso: Someraj Universitataj Kursoj, Boite postale (= poŝtkesto) 9, B-4000 Liège 3. Ne atendu tro longe, ĉar tiuj kiuj enskribigos frue, havos specialajn avantaĝojn!

Tiuj Someraj Universitataj Kursoj havas multajn celojn. Vi mem povos jam diveni kelkajn. Oficialigo de Esperanto troviĝas inter ili. Alia estas la longa preparo al iama vera universitato esperantlingva.

W. M. A. DE SMET



— Mi prenos ĝin nun sen motoro, por aĉeti la motoron mi organizos fonduson, la esperantistoj estas ja donacemaj.

KURTVOJOJ POR NIAJ KAMPANJOJ

Kun granda intereso mi legis en n-roj 42 kaj 43/44 de Esperanto-Gazeto la alvokon de Maria Vitályos, komisiito pri la Kampanjo en Sporto, kaj de Manfred Führer, gvidanto de la Kampanjo: E-o en Sociajn Organizaĵojn. Ni devas esti ege dankaj al tiuj senlacaj kunlaborantoj, kiuj kunordigas gravajn kampanjojn. Ni klopodu ĉiuj iel kunhelpi. Niavice mi provos kontribui per kelkaj sugestoj celantaj plifaciligi la taskojn de tiuj komisiitoj kaj iliaj kunlaborantoj. Iliaj planoj al mi ŝajnas tre konvenaj. Manfred Führer eĉ ellaboris sian planon plendetale, cementante tiel fundamenton por plej efika laboro. Sed unufoje starigita plano, ni vidu ĉu ni eble povus trovi kurtvojon al la kampanja laboro por ne laciĝi la kunlaborantojn kaj la gvidantojn mem per tro longa kaj elĉerpa procedado. Jen kelkaj ideoj, kiuj eble ne ĉiuj pruvigos realigeblaj, tamen tiu aŭ jena povus montriĝi taŭga, eĉ se post modifoj diktotaj de la praktiko.

Mi demandis min: kiam kaj en kio ni havis plejan sukceson? Sendube la pleja sukceso de IOE ĝis nun estis la pupteatraj festivaloj. La kialo? Ni uzis E-on por ne-esp-istaj aktivadoj. Tuj, sen longa preparado per kursoj, kiuj ja venis poste, kiam vekigis la intereso pere de la praktiko. Tio do estis kurtvojo. Ni serĉu kurtvojojn por Sporto kaj por E-o en Sociaj Organizaĵoj.

SPORTO. Ĉu ne eblas proponi al la gvidaj futbal-kluboj (por komenci ĉe nur unu sporto) la aranĝon de specialaj supernaciaj matĉoj dum, aŭ antaŭ, aŭ post la Olimpiko en Munkeno? La »supernaciaj matĉoj« konsistu el specialaj teamoj, kiuj organizigis el ludantoj diversnaciaj kaj diversklubaj libervole anonciĝontaj. Por tiaj teamoj kaj partioj ni preparus frazaron E-an de interkomprenado, sen neceso tui ellerni la lingvon. La intergrupaj matĉoj estu dediĉitaj al speciala Fonduso por sportistoj malsanigintaj, invalidigintaj aŭ handikapitaj. Nature tia aranĝo de »supernaciaj« futbalgrupoj en teamoj estus nur la unua paŝo, sekvota de similaj aranĝoj por aliaj sportoj. Mi ne dubas, ke la partoprenantoj en tiaj miksnaciaj grupoj, koniĝinte kun E-o pere de simplaj labor-frazoj (ekz.: pafu la pilkon dekstren, transdonu la futbalon al...), gardu vian flankon, ktp.) poste havos la deziron pli bone lerni la lingvon.

E-o en sociaj organizaĵoj. Ĉe ili dependos de la nombro de E-istaj membroj de tiaj organizaĵoj. Ni prenu ekz. la naturamikojn E-istajn. Ili aranĝas ĉiujare renkontiĝojn por si. Nu, kio simpla ol vastigi ilin iom per invito de ne-E-istaj naturamikoj? Ili ricevos antaŭe preparitan frazaron por uzo kun la E-istoj. Se oni aranĝas dum tiaj renkontiĝoj prelegojn, kial ne inviti prelegantojn ne-esperantistajn kaj tradu-


ki iliajn prelegojn por la samideanoj?

Ce aliaj organizaĵoj eble konvenos organizi internaciajn kunvenojn aŭ konferencojn pri fakaj temoj (ekz. IFEF, Omnitologia Rondo) kun E-o kiel pontlingvo anstataŭ aranĝi kunvenojn nur por E-istoj.

M. Führer tre prave klarigas, ke tri diverslingvaj grupoj de ekz. abelbredistoj povas jam utile ekuzi E-on. Mi opinias, ke por tio eĉ ne estas necese, ke ni antaŭe malfermu kurson por la grupanoj. Ni mem faru la kontaktojn por ili en la komenco kaj kiam tiu plene funkcios, ni postulu, ke unu aŭ pluraj membroj lernu E-on por transpreni nian komencan laboron. Tiam metodon de tuja uzo de E-o mi nomas kurtvojo.

Ernesto Sonnenfeld
Urugvajo

NOVAJ DIREKCIANOJ



NIKOLA NIKOLOV

Naskiĝis 1926 en Sofio, Bulgarujo. Esperantistiĝis en 1943, kiam li estis malliberigita pro kontraŭfascista agado. Dumviva ano de UEA kaj ties delegito pri turismo kaj sporto; ĝenerala sekretario de Monda Turismo; ano de la Komisiono por Turismo ĉe Bulgara Esperanto-Asocio kaj de ties Departementa Komitato en Sofio; prezidanto de turista sekcio »Esperanto« en Sofio. Iniciatinto de la Junulara Sekcio ĉe BEA, de internaciaj Esperanto-laborbrigadoj kaj de montodomo »Esperanto« sur Vitoŝa-monto; ano de Bulgara MEM-komitato; sekretario de la Komitato por Semajno de Internacia Amikeco en Bulgarujo, iniciatinto kaj unu el la redaktantoj de la bulgarlingva informabulteno »Esperant-ski Vesti«. Dekorita per ordeno »Por popola libero« pro lia multflanka socia agado kaj precipe esperantista.

SKOLTOJ KAJ ESPERANTO

Japanujo. S-ro Ken Fukuba ekde la unua de aprilo laboros kiel sekretario ĉe la Japana Skolt-Asocio. Pluraj skoltaj gazetoj jam enhavis anoncojn pri korespondado en Esperanto. — En Tokio oni fondis rondon por mez-kaj altlernejanoj kun la nomo Tutgalaksia Esperanto-Rondo (TERO). 10 kluboj el lernejoj en kaj ĉirkaŭ Tokio apartenas al ĝi, krom kelkaj izolitaj membroj. La rondo aperigas la organon »Sabotu kaj Rezigmu, la Estonteco Estas Nia«.

Kongo. Funkcias 3 kursoj por skoltoj, por skoltinoj kaj por skoltinaj gvidantoj. La konga skolta movado sendos al la Monda Skolta Jamboreo en Tokio en 1971 fortan delegacion, almenaŭ 50 skoltojn. Kontaktadreso de la kursanoj: Philibert Luyeye, B. P. 8503, Kinshasa 1, Kongo.

KOMISIONO POR LINGVAJ DEMANDOJ DE EŬROPA UNUIGO

En pasinta julio fondiĝis »Komisiono por lingvaj demandoj de eŭropa unuigo«, kies sekretario trovigas en Hamburgo. Tiun komisionon iniciatis Prof. D-ro Gyula Décsy, ĉefo de la finno-ugra seminaro de la hamburga universitato. La esplorprojekton financas la germana komunumo por esploroj (Deutsche Forschungsgemeinschaft). Sekretario kaj scienca kunlaboranto estas D-ro Harald Haarmann, kiu jam kontaktis la Centran Oficejon de GEA en Nürnberg. Al la komisiono krome apartenas profesoroj el Hamburgo, Oxford, Köln, Helsinko, Napoli, Bloomington (Indiana), Uppsala kaj Leuven.

La taskoj de la komisiono estas: eldoni katalogon de la eŭropaj lingvoj, fari indeksojn pri ĉiuj gramatikaj kategorioj komunaj al ĉiuj eŭropaj lingvoj, kaj ellabori la historian kaj kulturan evoluon de la lingvo-regionoj. Inter la esplorotaj lingvoj estas ankaŭ Esperanto. La sekretario de la komisiono skribis i. a.: »La problemoj de monda help-lingvo nature estas tute aktuala. Mi esperas, ke mi ne estas tro utopia, se mi asertas, ke ĉi tiu komisiono povas fari valorajn servojn al la propagandado de Esperanto.« Unu el la kunlaborantaj profesoroj el Hamburgo estas esperantisto.

(El PILO — PRESS)

Jen okazo por mencii la tre utilan ĉiusemajnan E-informilon de Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2 — sub la titolo »PILO — PRESS«, kiu lastatempe regule alvenadas kun interesaj informoj ĉefe el F. R. Germanujo, sed ankaŭ el la tuta mondo.

KAMPANJO ESPERANTO EN SOCIAJN ORGANIZAZOJN

Gepatroj, instruistoj kaj aliaj, atentu!

En Hanovro (F. R. Germanujo) okazos de 19-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro 1971 internacia tendumado de infanoj. Organizado estas la TAN-movado. Rajtas partopreni ĉiu infano (ankaŭ nemembroj) inter 9 kaj 13 jarojn aĝa.

En la prospekto, per kiu TAN invitas al la tendumado, estas legebla jeno:

Ne ordinara tendumado! Ni planis ion tute eksterordinaran! Ni invitas infanojn de eksterlandaj laboristoj, etajn turkojn, grekojn, hispanojn, italojn, k.a.; krome ni atendas malgrandajn gastojn el Francujo, Britujo, Aŭstrujo ktp. Komune kun tiuj infanoj germanaj infanoj volas dum tri semajnoj »endangerigi« Hanovron. Sur la programo staras, krom naĝado, ludoj, sporto, slojdoj, ankaŭ 4-taga ekskurso en la Harc-montaron aŭ en la Vezeran montaron, rondflugo super Hanovro, vizitoj al la polica centro, la zoologia ĝardeno, la urbodoma turo, la lago de Steinhude, la centra laktrafinejo, al ĉokolada fabriko, kaj multaj aliaj.

Akaŭ la kuirejo estos internacia. Ĉiu lando, el kiu infanoj venos, rajtos unu tagon aranĝi la menuon!


Ĝis nun por tiu internacia arango ne estas antaŭvidita la uzo de la internacia lingvo. Vere domaĝe, ĉu ne? Sed ni ja povas tion ŝanĝi. Kial ni ne partoprenu? Ek! Ni inundu la tendojn en Hanovro per Esperanton parolantaj infanoj! Laŭ la programo certe ĉiu infano trovos multan plezuron. Kaj la prezo, ĉu ĝi ne estas vera sensacio? La tuta restado dum 3 semajnoj, ĉio entenate: loĝado, manĝado, vartado far' spertaj profesiaj edukistoj, eĉ ĉiuj ekskursoj kaj vizitoj, ĉio kune kostas nur 35 usonajn dolarojn! (Tio ne estas preseraro!).

Se infano estas membro de TAN (kiu havas grupojn en multaj landoj), ĝi ricevas al tiu prezo eĉ ankoraŭ rabaton, tiam la restado kostos nur 28 \$. Kiu hezitas ankoraŭ? Aliĝu tuj kun viaj infanoj de 9—13 jaroj, la okazo estas unika! Se sufiĉe da junaj esperantistoj partoprenos, ni rajtos postuli esperantigon de ĉiuj aranĝoj.

La nombro de partoprenantoj estas limigita — kvankam oni rezervigis certan parton el la disponeblaj lokoj al eksterlandanoj. Ne prokrastu do la aliĝon. Skribu **esperantlingve** al:

Naturfreundejugend Deutschlands
Landesverband Niedersachsen
Maschstr. 24 (Haus der Jugend)
D-3000 Hannover
F. R. Germanujo.

Samtempe kun la aliĝo estas pagendaj 30,— germanaj markoj al la poŝtekkonto Hannover nro 5384 je la nomo Naturfreundejugend Deutschlands, Landesverband Niedersachsen, Hannover. La resto estas



— Sed kie estas la aliaj kursanoj?
— Dum ĉi tiu leciono mi koncentriĝos nur al vi.

pagenda ĝis la 1-a de aŭgusto al la sama konto, entute 100,— GM por membroj aŭ 125,— GM por nemembroj.

Pri via aliĝo informu ankaŭ la gvidanton de la kampanjo Esp. en Sociajn Organizaĵojn:

Manfred Führer, Poŝtfako 162,
D-3340 Wolfenbüttel, F. R. Germanujo.



Anoncetoj

Ilija Ivanov Mihalev, str. »Dunav« 10, RUSE, Bulgarujo — 22-jara konstruisto, deziras korespondi tutmonde pri oficialigo de Esperanto.

* Ing. G. J. Sevĉenko (36-jara), ul. K. Libkneĥta 15, kv. 32, DNEPROPETROVSK-70, Sovetio kolektas PM, RK, kartmaksimojn, insignojn.

* 23 jara junulo, litovano, studento, entuziasmulo de piedpilkado volas korespondi tutmonde kaj interŝanĝi memoraĵojn (insignoj, poŝtmarkoj, etiketoj, programon de konkuroj, kalendaroj, gvidiletoj ktp... pri piedpilkado). Mi rekompencos per similaj memoraĵoj el Sovetio. VENISLOVAS Riĉardas. JONIS-KELIS. Hospitalo. Litovio, SSSR.

* Kvar junaj komencantoj dez. kor. kaj interŝ. bk k pm. Adreso: Kočiš Ján, 29. Augusta 3/79, HANDLOVA, okr. Prievidza, Ĉeĥoslovakio.

* Kolektas pm kaj bk du 15-jaraj knaboj. Jonas Kriukas Ežero — 7, PASVALIS, Litovio, Sovetio.

* Volas bicikli tra 28 landoj, pro tio deziras korespondi pri E-ismo, ekskurso, filozofio, literaturo kaj ĉt. Kolektas popularajn kreaĵojn, landkartojn k bk. Ferenc (25j) k Zoltan (20j) BORZA, Fünge u. 31., ARPADFÖLD, Hungarujo.

* Deziras korespondi pluraj membroj. Esperanto-Societo »Bjalistok«, MADAN, Bulgarujo.

IOE estas peranto por

OOMOTO (nur por Jugoslavio) — abonotizo 25,— dinaroj.

INTERLIGILO, bulteno de IPTEA (Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperantista Asocio) — abonotizo 1 US \$ aŭ egalvaloro, por Jugoslavio 12,50 dinaroj.

Ĉe IOE estas aĉeteblaj

- MONDMAPO (kun ĉiuj ĝis nun fiksitaj Esperantaj nomoj) US \$ 1,—
- INSIGNOJ »Esperanto parolata« emajlitaj (larĝo 21 mm) US \$ 0,50
- INSIGNOJ »Esperanto parolata« glueblaj al ĉiu materialo (120 mm) US \$ 0,20
- INSIGNOJ »Esperanto parolata« tolaj por deĵorantoj US \$ 0,20
- GRAMOFONDISKO de Mišo Zdravev: Bonan nokton; Steletoj; Mia kubo; Ludvika Aleksandra (n-ro 1) US \$ 1,—
- GRAMOFONDISKO de Mišo Zdravev: Servu ni; Revenu vi; Ropotamo; Mia eta Gim (n-ro 2) US \$ 1,—
- GRAMOFONDISKO kun turismaj koruskantoj (Bulgarujo) granda US \$ 1,50



RECENZOJ

Béla Balázs (Bela Balaĵ): LA SEP REGIDOJ, ilustraĵoj de Adám Würtz (Adam Virĉ), tradukis Eva Farkas-Tatár (Eva Farkaŝ-Tatar), formato 24,5 x 33,5 cm, kartone bindita, 24 paĝoj, prezo ne indikita.

Tre interesa febelo kun eduka enhavo por infanoj, riĉe ilustrita multkolora kaj tre moderne. Grandlitera pura preso. Bonega traduko. Oni povus eble riproĉi pro la tro ofta uzo de la vorto »ververe« kaj pro kelkfoja uzo de »ĉi« por okazajoj »iam antaŭlonge«, do ne proksimaj — influo de la originala lingvo. Cetere mi trovis nur 1 preseraron kaj 3 gramatikajn eraretojn, sed ili tute ne malaltigas la valoron de la libro, kiu povas fieri inter la porinfanaj libroj, tre taŭga por okaza donaco.

Sekanto

ESPERANTSKI VESTI (Esperantaj informoj) nacilingva informa bulteno de Bulgara Esperanto-Kooperativo. Aperas 4 foje jare je 1500 ekzempleroj. Interesa varia enhavo disdonata senpage al la membroj, redakcioj kaj elstaraj landaj funkciuloj. Modelo, kiel oni devas fari por informi la eksteran publikon, anstataŭ en sia Esperanta organo duonon de la teksto presigi en Esperanto.

Pri: RECENZO DE PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (en EG 43—44).

Ĉiuj ni akordas, ke temas pri altvalora, eĉ grandioza verko, same ni interakordas, ke ekzistas en ĝi tiu aŭ alia makuleto, tiu aŭ alia kritikindaĵo, kio cetere en tia monumenta verko ne eviteblas. Sed, kara Sekanto, mi ne konsentas pri viaj riproĉoj de la ortografio uzita en PIV ĉe transskribo de geografiaj aŭ aliaj propraj nomoj. Mi ja konsentas, ke en gazetartikoloj oni uzu la originan ortografion, indikante parenteze la proksimuman prononcon, ekz.: Churchill (pr.: Ĉerĉil aŭ Ĉarĉil), sed ĉe plena esperantigo de konataj nomoj devas nin regi aliaj principoj, nome: 1e) konservi plejeble la vortbidon, 2e) konsideri laŭeble la proksimuman prononcadon, se tio ne malhelpas la grafikan rekoneblon. »Ajdaho« nepre malhelpas la facilan rekoneblon. Tial ili ne estas akcepteblaj. Multaj ja ne konas la ĝustan elparoladon de fremdaj nomoj, pruvo de tio estas ja via maljusta kritiko de la vorto »Maĝaro«. Nu, vi juĝas laŭ la serba transskribo, kiu ĉi-kaze baziĝas sur misprononco. Kiom da personoj scias (aŭ ĝis antaŭ ne longe sciis) ke Houston prononciĝas Hjust'n (ne Haŭst'n) kaj Seattle: Si-eti (ne Siti) kaj ke Illinois estas prononcata [jen Ilinoa' (francmaniere), jen Ilinojs', aŭ Los Angeles estas prononcata de multaj usonanoj duonhispane: Loui Anheles kaj La Jolla: La Hoja?]

Pri 2): Uzi majusklojn Vato anst. PIV-a vatto, ktp. ne ŝajnas praktika solvo. Sed E-o fakte havas jam duoblajn konsonantojn en vortoj kiel »mallonga«, »forrajdi«, »transsalti«. Kial ni ne povus ankaŭ digesti kelkajn vortojn kiel vatto, brutte, ballo (anstataŭ »sakpako«, ne anstataŭ »balo« — danckunveno)?

Pri 3): Laŭ la Fundamento la monatomoj (Januaro ktp.) estas skribataj majuskle, la semajnomoj minuskle.

E. Sonnenfeld, Urugvajo

* BALARUC-les-BAINS, franca faldfolio kun aldona Esperanta klarigo pri »STELO« Kampadejo.

* FIAT 124 SPECIAL kaj FIA 124 SPECIAL T. Jen nova kolorriĉa prospekto de fabriko kiu abunde uzas Esperanton en sia propagando. Du tabeloj, el kiuj unu montras la eksterajn, alia la motoron kaj aliajn internajn partojn. Ĉio en bela celofansaketo.


* HELSINKI, filino de Balta maro, bela multkolora faldfolio kun mapo. Mendu ĉe: Turisma oficejo de la urbo Helsinki, Pohjoinen Esplanaadikatu 19, Helsinki-10, Finnlando.

* VÄSTER-NORRLAND, Svedujo. Plurkolora faldfolio pri regiono de orienta Svedujo norde de Stokholmo, kun mapo kaj belaj pejzaĝoj. Mendu ĉe: Västerorrlands turisttrafikförbund, Box 91, S-871 01 Hänsösand, Svedujo.

* Sabadell Esperantista N-ro 98 (jan-febr. 1971), tre simpatia stencilita revuo kun 2 paĝoj da ofsetitaj bildoj — altiris nian atenton per tre interesa intervencio de V. Hernández Llusera pri la trouzo de akuzativo.

* BULTENO DE INTER — SOCIETO POR LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO EN RADIO, aperas 1 fojon jare, prezo 1 US \$ aŭ egalvaloro, eldonas: INTER Agadgrupo por Esperanto, Box 550228, S-400 53 GOTENBURGO, Svedujo. Ĝi celas instrui kiel plej bone aŭdi Esperantajn elsendojn per via ricevilo, kaj instigi la radio-staciojn enkonduki Esperantistajn elsendojn. Tiucele ĝi aldonas kelkajn poŝtkartojn por skribi al la elsendejoj. Ĝi petas proponojn kiel organizi kampanjon en multaj landoj. Eĉ premioj estas antaŭviditaj.

Nia propono estas: kunlabori kun IOE, kies celo estas enkonduko de Esperanto en la praktikan uzon en ĉiuj branĉoj de homaj aktivadoj, kie internaciaj rilatoj estas konstantaj, interalie ankaŭ en la informfako (gazetaro, radio, televido ktp.). Kompreneble la celo de IOE ne estas nur atingi kelkminutan Esperantan elsendon, sed eĉ ke la diversnaciaj radiostacioj inter si rilatu en Esperanto. Eble INTER povus transpreni la tutan kampanjon aŭ ĝian parton. Esperanto-Gazeto povus al pli vasta publiko komuniki la sugestojn de INTER kaj pli ofte ol unu fojon jare.



PAPERKANONOJ — 20

- 148. Österreichisches Museum für Volkskunde, Landongasse 15—19, WIEN VIII., Aŭstrujo.
- 149. Musée d' Ethnologie Régionale, Gildekamersstraat 2—6, ANTVERPEN, Belgujo.
- 150. Národní muzeum, Václavské nám. 68, PRAHA 1 — Nové Město, Ĉeĥoslovakio.
- 151. Musée de la Marine et de la France d' Outre-Mer, Parc Chanot, MARSEILLE, Francujo.
- 152. Museo Etnológico Antropológico, Calle de Alfonso XII., MADRID, Hispanujo.
- 153. Néprajzi Múzeum, Könyves Kálmán körút 40, BUDAPEST VIII. Hungarujo.
- 154. Galleria degli Uffizi, Loggiato degli Uffizi 6, FLORENZA, Italujo.
- 155. Narodni muzej, Trg Republike 1, 11000 BEOGRAD, Jugoslavio.
- 156. Anne Frank Huis, Prinsengracht 263, AMSTERDAM, Nederlando.
- 157. Muzeum Slaskie, ul. Powstancow Warszawy 5, WROCLAW, Pollando.
- 158. Muzeul regional al Banatului, Piata I. Huniade, TIMISOARA, Rumanujo.

Ni petas dum ĉiu monato skribi al du el la supraĵ muzeoj (ne laŭvice), petante diversajn informojn (ĉiam nur en Esperanto!), ekz: kiam ĝi estas malfermita, ĉu ĝi havas Esperantan gvidiston aŭ katalogon, kiaj estas la kondiĉoj por grupa vizito ktp.

DONACIOJ POR LA FONDUSO »OFICEJO«

Stella De Weerd, Belgujo	\$ 2.—
A. Dopp, F.R. Germanujo	\$ 2,73
Zaga Milosavljević, Jugoslavio	\$ 2.—
Hans Schütt, F.R. Germanujo	\$ 5,46
Yngve Cederholm, Svedujo	\$ 5.—
Nikola Nikolov-Roko, Bulgarujo	\$ 8,57
Ivan Andrejević, Jugoslavio	\$ 1.—
Antaŭe kvitancita	\$ 995,61
Entute	\$ 1022,37

DONACIOJ AL LA GENERALA KASO

A. Dopp, F.R. Germanujo	\$ 0,41
L. Dovat, Svisujo	\$ 0,23
Rudolf Bartosch, Aŭstrio	\$ 1,92
John Matasin, Aŭstralio	\$ 20,80
Johannes Palu, Sovetio	\$ 1,40
Thorsten Farm, Svedujo	\$ 1,50
Petr Mustafčiev, Bulgario, (5 levoj)	

LIBRODONACIOJ

David Maria, Hungarujo	2 libroj
------------------------	----------

ORA LISTO DE I. O. E.

por februaro 1971.

1. S-ino Dorothy Henderson, Kanado US \$ 1387,20
2. F-ino Betty Salt, Kanado „ „ 962,40
3. H. Scheffer, F. R. Germanujo „ „ 204,96
4. Hans Werner Grossmann, Svisujo „ „ 116,24
5. M., Italujo „ „ 81,20
- 6-7. Felix Epstein, F. R. Germanujo kaj Ernesto Sonnenfeld, Urugvajo, po „ „ 75,—
8. Arne Pedersen, Danujo „ „ 70,70
9. Gian Carlo Fighiera, Belgujo „ „ 56,—
10. Miloslawa Kolinska, Pollando „ „ 50,71

Plej proksimaj kandidatoj: A. kaj T. Sekelj (po 41,70), A. N. (F. R. Germanujo 34,84), V. Kruusalu (34,08), John Matasin (31,—), Hans Bakker (filo) (30,63), ing. J. Dettwiller (25,12), Ludviko Memesmaecker (23,—), Zaga Milosavljević (18,80), Koloman Novak (16,75).

MEMBROJ-SUBTENANTOJ POR 1971

John Matasin, Aŭstralio
Hans Schütt, F. R. Germanujo
Yngve Cederholm, Svedujo
Nikola Nikolov, Bulgarujo

PERANTOJ

Argentino: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, ROSARIO
Aŭstralio: Kenneth G. Linton, 11 Poplar St., SOUTH CALFIELD, Vic. 3162. Abono: \$ 2.—
Aŭstrujo: Aŭstria Esperanto Movado, Hofburg, Bathyanystiege, A-1014 WIEN.
Belgujo: „HEROLDO DE ESPERANTO”, 13 rue de la Reinette, Bruselo 1., Abono 100 b. fr.
Brazilo: Alfredo Enio Duarte, Caixa Postal 18 (Esperanto) ZC-00, RIO DE JANEIRO, E.G.B., kaj BRAZILA ESPERANTO-LIGO, Praca de República 54, RIO DE JANEIRO.
Britujo: Brita Esperanto Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W 11.
Bulgarujo: Petr Ivanov Mutafčiev, ul. Persenk, bloko 20-A, SOFIA-7, tel. 62 18 24; kaj Jordan D. Kalinov, Bul. „G. Dimitrov”, bl. „Debeljanov” A-20, RUSE. — Tel. 25877. Abonprezo 5 levoj.
Ĉeĥoslovakio: Jos. V. Otta, Vančurova 34, ŠUMPERK Jarabono 44 Kės. kaj DOVOZ TISKU, Praha 2 Vinohrady, Vinohradská 46.
Danujo: Ing. Uwe Lohse, str. Bakkesvinget 5, 3400. TULSTRUP/Hilrd. Poŝtgirkonto 14 41 16. Abono DK 14.—
Finnujo: Joel Vilkki, SOMERO-9.
Francujo: Germaine Kirtz, 5 bd des Alliés, F-68 MULHOUSE; Pck STRASBOURG No 993.48. — Abono: F 12,50.
Germana Feder. Resp.: Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 WOLFENBÜTTEL; poŝtekkonto: Karlsruhe 1154 71.
Grekujo: Kimon G. Eliopoulos, 130 El. Venizelos str. NOVA SMIRNA — ATHINAI. Tel. 931-214.
Hindujo: Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, NEW DELHI-1.
Hispanujo. Juan-Luis Vallés, Apartado 7018, BARCELONA. Abono 140 pesetoj.
Hungarujo: Hungara Esperanto-Asocio, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII.
Israelo: Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379 PETAH TIKVA Ab. 6 liroj. Poŝtekk. Bank Hadoaz 4-45854-8.
Irlando: Pat O'Reilly, „Woodbine”, Bluebell, Dublin 12.
Italujo: Dott. Giovanni Marchiori, Via Cantore 15 (Gal-

leria Astra), 37100 VERONA. Abono 1.200 Liroj, poŝtgirkonto n-ro 28/22942.
Japanujo: Internacia Fako, OOMOTO, Kameoka, Kio-to-hu
Jugoslavio: IOE, 11000 BEOGRAD, Lole Ribara 14 ĉk 608-8-1353-10. Abono 20 din.
Kanado: W.D.B. Hackett 326 Soudan Ave, TORONTO 7. Ont.
Kubo: Raúl Juárez Sedeno, Apartado 570, CAMAGÜEY.
Madagaskaro: Eugène Ravéloson, Boite Postale 1678, TANANARIVO.
Meksiko: F-ino Margarita Nájera S., Apartado Postal M-9310, MEXICO-1-D. F.
Nederlando: Ing. D. Klage, Talingstr. 8., SCHOORL (NH). — Abono 7,50 hfl al Boerenleenbank Schoorl (NH), Kto 5082 R.
Norvegujo: Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlano) Novzelando: J. T. Allan, 12 Lonsdale ave., RONGOTAI, WELLINGTON 3.
Pollando: S-ino Miloslawa Kolinska, Sopocka 2/2, SZCZECIN
Portugalujo: D-ro A. César Anjo, Av. 28 de mayo 12, VISEU.
Rumanujo: Maria Vitályos, C, postala 14, TIRGU SECUIESC, jud. Covasna.
Sovetio: Ivan Palkin, ul. Televidenija d. 7, kor. 3, kv. 44, MOSKVA M-449.
Johannes Palu, Sölme 21, TALLINN 16.
Panas Vasilčenko, Poŝtkesto 375, KIEV 24.
Abonprezo 4 rub.
Svedujo: Gerhard Nyqvist, Johan Skyttes väg. 5 JÖNKÖPING. Poŝtgirkonto 89 299.
Svisujo: Claude Gacond, Miéville 133, CH-2314 LA SAGNE. Abono 9 Sv. Fr.
Usono: Conrad Fisher, R.F.D. No. 1., MEADVILLE, Pa. 16335.
Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Aptdo. 146, VALENCIA, Edo. Carabobo.
El ĉiuj aliaj landoj perantoj serĉataj. Perantoj ricevas 20%-an rabaton por kovri la kostojn.
ABONPREZO: 2 dolaroj aŭ egalvaloro